HUNGARA VIVO

3
1981
13,–Ft

ĉio ĉi — originala!

NÉPMŰVÉSZETI·ÉS·HÁZIIPARI·VÁLLALAT·

Ni ofertas en niaj 80 vendejoj
la plej belajn originalajn kaj
unikajn produktaĵojn de la popolarto
de hungaraj regionoj:
bluzojn, robojn, teksaĵojn, brodaĵojn,
artiklojn por donaci.

POPOLARTA KAJ HEJMINDUSTRIA
ENTREPRENO

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H–1368
Aperas dumonate
XXIa jaro, 1981 n-ro 3
(97)

ENHAVO

Benczik, V.: Kunvenis la hungaraj esperantistoj 82
Bálint, Sz.: Regionoj de Hungario – Departemento Fejér 84
Kaffka, M.: Peĉjo ekiras (T. *Bessenyei*) 87
Kosztolányi, D.: Aurelius (D-ro T. *Kiss*) 88
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 13. (P.A.*Rados*) 90
Bényei, J.: Oldaj tri paŝtistoj (T. *Papp*) 93
Libroprodukto 1980 93
Mihalkov, G.: La sinjoro instruisto 94
Vinokurov, J.: Mi vizitis denove, Edzino (M. *Fejes*) 95
Baka, D-ro A.: La solvo de la trisekcado (E. *Fenyvesi*) 96
László, I.: Pri Miklós Izsó 97
Francis, J.J.: Plankatene 98
Hules, A.: Kiel la ekskursanto 98
Kock, E. de: Arta transmuto, El la lerneja mondo 98
Takács, I.: Ŝerca fabelo pri belo 98
Abonyi-Nagy, Á.: Norde falis stelo... 99
Kalocsay, K.: Rimportreto 99
Dresen, H.: Paduso, Kion diri, kiel miri... 99
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 100
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 103
Fejes, M.: Metiejo 104
Bálint, Sz.: La edzino de aŭtomobilisto 105
Nemere, I.: Turmento 105
László, F. d-ro: Vagado sub la stratoj de Budapeŝto 106
Bálint, Sz.: La heredaĵo 112
Leterkesto 114
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 115
Recenzoj de V.*Benczik*, E.*Fenyvesi*, P.*Poliŝĉuk*, *Prunelo* 116
Inkubo de la kubo (*V.B.*) 118
Szabó, I.: Rendevuo kun la futuro 118
Krucenigmo 119
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 119
Korespondi deziras 120

La historia urboparto de Székesfehérvár (Foto de Z. *Fejér*)

Jam la sesa numero...

de Hungara Vivo atingas Vin dum tiu ĉi jaro, Kara Leganto, kvankam ankoraŭ eĉ ne pasis ses plenaj monatoj de 1981. Pro la malfruiĝo de la pasintjaraj numeroj 4-6 HV fariĝis kvazaŭ «monata» revuo. Post ĉ. unu monato atingos Vin la numero 4/1981, kaj poste ni refariĝos dumonataĵo: la kvinan numeron de 1981 atendu en septembro, kaj la sesan en novembro. Tio kompreneble rilatas niajn legantojn en Eŭropo – en aliaj kontinentoj oni bezonos iom pli da pacienco, tamen ne tiom, kiom necesis pasintjare por ĝisatendi la aperon de HV.

Akceptu konsilon, kaj komencu la tralegadon de tiu ĉi numero sur la sekva paĝoparo, kie troviĝas raportaĵo pri la Delegitara Kunveno de HEA, okazinta fine de marto en Budapeŝto. La aktivado kaj la forto de la hungara Esperanto-movado ebligas ankaŭ la vivon de nia revuo, kiu aperas jam 21 jarojn sen-interrompe. Se vi ĵetos rigardon super la enhavtabelon, Vi trovos, ke tiu ĉi estas la 97-a numero de HV – per simpla aritmetika operacio oni povas antaŭvidi, ke la numero 6/1981 estos do la 100-a numero. Certe ni elpensos ion por inde festi tiun jubileon – se Vi havas bonan ideon por tio, ne hezitu skribi al ni!

Eniris tiun ĉi numeron du noveloj kaj pluraj poemoj, el kiuj lastaj tiu de Margit *Kaffka* aperas omaĝe al la Internacia Tago de Infanoj. En tiu ĉi numero oni trovos kune ĉiujn niajn konstantajn rubrikojn, kiuj estas tiel multaj, ke eble oni devus iom redukti ilian nombron? La Redakcio volonte aŭdus Vian opinion pri tio.

Interesan matematikan novaĵon prezentas la artikolo de A. *Baka*, kiun volonte legos verŝajne ankaŭ ne-matematikistoj. Enigmo-amatoroj nepre ne preterlasu *Metiejon*, kiu ĉi-foje malfidelas al literaturaj problemoj – ĝi alvokas kunmeti krucenigmojn!

Nu, tiu ĉi redaktora enkonduko denove fariĝis nura revuado de la jena numero, kaj lanĉiĝas la penso, ĉu entute necesas io tia, ja ĉiuj legantoj havas fingrojn por trafoliumi kvardek paĝojn, kaj elekti tion, kio plaĉas al ili. Eble estus prudente komenci la redukton de la nombro de rubrikoj je tiu ĉi? Ĉiukaze, almenaŭ tiun ĉi enkondukon vidu jam finita...

Kunvenis hungaraj esperantistoj

La 21-an kaj 22-an de marto kolektiĝis pli ol 200 esperantistoj en la Budapeŝta Kulturdomo „Láng", bone konata por la partoprenintoj de la ĉiujaraj Vintraj Esperantistaj Ferioj. Tamen nun oni kunvenis ne por gaje adiaŭi la malnovan jaron kaj saluti la novan, sed por serioza laboro.

La menciitaj 200 esperantistoj estis delegitoj de ĉ. 130 esperantistaj grupoj de Hungario. Ili faris superrigardon pri la kvarjara laboro de la hungara Esperanto-movado depost 1977, kaj difinis la kadrojn de agado dum la sekvaj kvin jaroj.

Al la Delegitara Kunveno estis invititaj ĉiuj gravaj sociaj organizaĵoj de Hungario, kaj ankaŭ reprezentantoj de kelkaj instancoj, kies funkcioj iel parencas kun la agadtereno de esperantistoj. La Tutlandan Konsilantaron de la Hungaraj Sindikatoj reprezentis József *Timmer,* sekretario de tiu prestiga organizaĵo, ĉeestis reprezentanto de la Hungara Socialisma Laborista Partio, vicprezidanto de la Hungara Packonsilantaro, sekretario de la Tutlanda Kooperativa Konsilantaro, reprezentanto de la Patriota Popolfronto, de la Hungara Komunista Junulara Asocio, vicestro de la Hungara Fremdultrafika Oficejo kaj aliaj. D-ro József *Pál*, sekretario de la Kooperativa Konsilantaro, kaj Márton *Lengyel,* vicestro de la Fremdultrafika Oficejo, mem esperantistoj, estis elektitaj komitatanoj de HEA. Ĉeestis ankaŭ eksterlandaj gastoj, el Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR.

Riĉa raporto

La raporto de la Estraro, prezentita al la Delegitara Kunveno, amplekse 46 paĝojn. (Krom la raporto estis prezentitaj al la Kunveno por aprobo ankaŭ la nova Statuto kaj la Ekzamena Regularo de la Asocio.) Foliumante tiun ĉi kronikon de kvar jaroj, oni ekscias interesajn ciferojn pri HEA. La nombro de ĉiuj membroj estis fine de la pasinta jaro 5899 (antaŭ kvar jaroj 5366); el tiuj aktivaj membroj 3079 (2768 antaŭ kvar jaroj).

La delegitoj ricevis detalan prezenton pri la agado de la Estraro, Centra Oficejo (kie laboras 12 plentempaj oficistoj), kaj diversaj fakaj komisionoj, redakcio de gazetoj. Oni povas konstati, ke pluraj el ili laboris bone, sed restas ankoraŭ farendaĵoj, precipe sur la propaganda kaj instrua kampoj. Elstaraj rezultoj estis atingitaj koncerne la fakan aplikadon de la lingvo, en la turismo (nur dum la jaro 1980 pli ol *ses mil* personoj partoprenis la hungarlandajn esperantistajn turismajn aranĝojn), kaj en la junulara movado. Daŭre vigle agadis la packomisiono kaj virina komisiono. La raporto konstatas, ke la Asocio multe profundigis siajn interrilatojn kun aliaj sociaj organizaĵoj, kaj ĝenerale kun la neesperantistoj.

La delegitoj povis legi la raporton ne nur de la centraj organoj, sed ankaŭ tiujn de la 18 departementaj Esperanto-komitatoj. La raportoj de tiuj komitatoj donis klaran bildon pri la *vera* ĉiutaga vivo de la hungara Esperanto-movado, kaj servas kiel bona bazo por posta interŝanĝo de spertoj inter la opaj departementaj komitatoj aŭ eĉ lokaj grupoj.

D-ro Endre Baráth prezentas al la Kunveno la raporton de la Estraro. Dum la pasintaj kvar jaroj li funkciis kiel vicprezidanto, kaj nun elektiĝis kiel ĝenerala sekretario. D-ro Baráth plenumas gravajn taskojn en la hungara socia vivo: li estas parlamentano, kaj sekretario de la parlamenta komisiono pri kulturo

Parto de la prezidantaro. Maldekstre staras József Ţimmer, sekretario de la Tutlanda Konsilantaro de Sindikatoj, apud li d-ro Ferenc Nezvál, eksministro pri justico, ĝisnuna kaj novelektita prezidanto de HEA



Partoprenantoj de la Kunveno

Supre: Kunveno de la redakcianoj kaj legantoj de Hungara Vivo. Sube: Aĉetantoj ĉe la libroserva vendotablo

Gastoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR salutas la kunvenon

La novelektita Komitato havas sian unuan kunsidon

Indan atenton ricevis en la raporto ankaŭ la eldona aktiveco de la Asocio. Dum la lastaj kvar jaroj HEA eldonis 31 librojn sur entute ĉ. 4500 paĝoj, en ĉ. 95000 ekzempleroj, kaj aperigis ses signifajn propagandajn eldonaĵojn en pli ol 100.000 ekzempleroj. Oni notu, ke HEA eldonas kvin revuojn, tiuj havas dum unu jaro 31 numerojn!

Laborplano por la futuro

La Delegitara Kunveno pritraktis kaj akceptis la laborplanon kaj buĝeton por 1981. La laborplano dediĉas specialan atenton al la firmigo de la organizaj bazoj kaj kadroj, kaj emfazas la gravecon de la altigo de nivelo en la organiza laboro. Ĝi rekomendas, ke la departementaj komitatoj kaj lokaj grupoj ankaŭ vigligu sian kunlaboron kun la departementaj kaj lokaj komitatoj de tiuj sociaj organizaĵoj, kun kies landa estraro HEA havas bonajn interrilatojn. Tiaj kontaktoj povos rezultigi ne nur subvenciojn por la departementa kaj loka agado, sed ankaŭ novajn terenojn por la disvastigo de la Internacia Lingvo.

La laborplano preskribas pli dinamisman propagandan kaj instruan agadon, kaj ankaŭ pli aktivan partoprenon en la laboro de internaciaj esperantistaj organizaĵoj, kiel UEA, MEM kaj aliaj.

La eldonplano antaŭvidas dum 1981 15 titolojn, la turisma kalendaro 10 tutlandajn kaj pluajn 10 regionajn aranĝojn. La buĝeto iom postrestas al la pasintjara, tamen la fina cifero – iom pli ol 5000.000 da forintoj – egalas al ĉ. 1250 mezaj monatsalajroj.

Novaj gvidorganoj

La Delegitara Kunveno elektis novan Komitaton, kun 75 membroj. Proksimume triono de la komitatanoj estas novaj homoj, do, oni povas diri, ke la elektoj efektivigis sanan evoluon. Okazis pli-malpli same pri la nova, 19-kapa Estraro, en kiu ankaŭ proksimume triono de la membroj estas novuloj.

D-ro Ferenc *Nezvál*, parlamentano, eksministro pri justico, reelektiĝis kiel prezidanto de HEA. Novaj vicprezidantoj estas d-ro Ottó *Haszpra* kaj d-ro Imre *Pethes*. Ĝenerala sekretario elektiĝis d-ro Endre *Baráth*, parlamentano sekretario de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento. (En la ĝisnuna Estraro li laboris kiel vicprezidanto.) Tibor *Vaskó* reelektiĝis kiel sekretario; li respondecas ankaŭ pri la direktado de la Centra Oficejo.

Sukcesa Kunveno

La sukceso de la Kunveno fontas unuavice el la farita oficiala laboro, sed oni ne forgesu ankaŭ pri la utilo de la personaj, amikaj interparoloj, okazintaj en la koridoro, dum paŭzoj ĉe la librostando (kiu ĉifoje tamen vendis iom modeste) ktp. La Redakcio de HV vespere de la unua tago (sabato) havis sukcesan kunsidon kun la amikoj de la revuo, kaj neformale kunvenis ankaŭ membroj de kelkaj fakaj komisionoj. La Delegitara Kunveno estis vera revuo de la hungara Esperanto-movado, kiu – laŭ la spertita aktiveco kaj seriozeco de la delegitoj – fariĝis unu el la signifaj kaj prestiĝaj kulturmovadoj de Hungario.

Departemento Fejér



Historia resumo: Tiu teritorio situas sur la orienta parto de Transdanubio, ĝia amplekso estas 4.374 km^2, kaj havas 410 mil loĝantojn. La patrujokupantaj prahungaroj ĉirkaŭ en la jaro 900 ekposedis tiun parton, kiun limis la Danubo, la montetoj Gerecse, Pilis, Vértes, Bakony ĝis la lago Balatono. La regnestro de hungaroj, Árpád, elektis lokon sur tiu monteto, kiu elstaris el la marĉo Sárrét. Poste la regnestro Géza kaj la unua hungara reĝo István, ĉi tie konstruigis la fortikaĵon Székesfehérvár, kiun la latinlingvaj tiamaj ĉartoj nomis: *Alba Regia.* De tiu tempo (970) ĝis la turka konkero (1543) dum kvin kaj duona jarcentoj Székesfehérvár iĝis la centro de la hungara ŝtatpotenco. Por defendi la urbon, la reĝoj loĝigis ĉirkaŭ ĝi diversajn nomadajn memstarajn gentojn. Mem la urbo Székesfehérvár centran privilegion ricevis de la reĝo István la 1-a, Béla la 4-a kaj Lajos la 1-a. La loĝantoj ĝis la 15-a jarcento estis ĉefe italaj komercistoj, metiistoj kaj kamparanoj, kiuj ekflorigis la foirojn. Poste la hungaroj ellernis ĉion, kaj ĉesis la fremda karaktero de la urbo.

En 1543 komenciĝis la turka jugo, kiam dum 145 jaroj la departemento Fejér iĝis parto de la turka imperio. En la vilaĝojn enmigris multe da sudsklavoj. Dum tiu tempo la departemento ĉesis funkcii, la urbon Székesfehérvár la turkoj nomis: *Istolni Belgrad.* Fine en 1688 la Habsburgoj liberigis la tutan teritorion, kaj la reorganizado okazis en 1692, kiam novaj bienuloj aperis tie: la familioj Zichy, Batthyány, Heisler, Eszterházy. Malrapide la fremda loĝantaro hungariĝis, ekde 1780 en Székesfehérvár, kaj post 1830 en la vilaĝoj. Baldaŭ estis fondita (eklezia) hungarlingva gimnazio, kaj fondiĝis ankaŭ hungara teatra trupo.

La 26-an de septembro en 1848 la kroata armeo okupis la urbon Székesfehérvár, sed post tri tagoj la hungaroj ĉe vilaĝo Pákozd triumfis super la okupantoj kaj la kroatoj rifuĝis el Hungario. Kiel oni scias, la „printempon de l' popoloj" en 1848/49 sekvis subpremo, kaj tio, kiel en la tuta lando, ankaŭ en la departemento Fejér daŭris preskaŭ dum jarcento.

La departemento Fejér liberiĝis la 23-an de marto 1945 kaj komenciĝis la forigo de la ruinoj kaj la rekonstruo. Dum la dua mondmilito post Budapest, Székesfehérvár suferis la plej grandan difekton, 40% de la domoj ruiniĝis. Sed nun ni ekkonu iom la ĉefajn trezorojn de la departemento:

La lago Velencei. Kelkaj detaloj jam estis legeblaj en la pli fruaj numeroj de HV, tamen pri tiu belega feriejo necesas diri kelkajn vortojn. Ĝi situas de Budapest je 45, kaj de Székesfehérvár je 10 km, apud la grandaj aŭtoŝoseoj. Freŝaj boskoj, aleoj, junulara tendaro, longa vico de hoteloj kaj sindikataj ripozdomoj, buntaj vilaoj, svarmantaj boathavenoj, verdaj herbaroj sur la sunlumaj strandoj, la blueta, brilanta varmeta akvo, kaj sub la lazura ĉielo sur la transa bordo de la lago estas videbla la monteto Pákozd, kaj sur la deklivo de monto Vértes enviciĝas la vinberĝardenoj. En la apudlagaj vilaĝoj estas diversaj vendejoj, elegantaj kaj romantikaj restoracioj, brila elektra lumigado, akvokonduko kun fontanoj, tergasaj instalaĵoj kaj en la parkoj altvaloraj skulptaĵoj inter la diverskoloraj floroj. Sur la akvosurfaco de 26 km^2 blankaj velŝipoj flosas kaj ekskursŝipoj kunportas somere milojn da somerumantoj.

Martonvásár. Beethoven plurfoje estis la gasto de la familio Brunszvik en la romantika kastelo, kie nun rezidas la Agrokultura Esplora Instituto de la Hungara Akademio de Sciencoj. En la mezo de praparko estas lago kun ĉarma insulo, kie Beethoven ofte komponis. Sur la insulo staras lia ŝtona skulptaĵo. Nuntempe ĉiujare trifoje okazas ĉi tie memorkoncerto en la subĉiela parkkoncertejo, kie estas 2000 sidlokoj.

La malnova urbocentro de Székesfehérvár

Ĉiam plu kreskas la nova urbo Dunaujváros



Pacienca kaj grandrezulta laboro de arkeologoj en Tác-Gorsium

Tác–Gorsium. Sude de Székesfehérvár situas la malkovritaj ruinoj de la preskaŭ 2000-jara Gorsium, kiun en la 1-a jarcento la romianoj fondis ĉe la kruciĝado de du landvojoj. En la 2-a jc. la cezaro Trajanus konstruigis grandan urbon por religia centro kun grandaj palacoj. En 178 la sarmatoj detruis la urbon. En 202 la cezaro Septimius Severus rekonstruigis ĉion kun belaj mozaikoj, sed la sarmatoj denove ĝisfunde ĉion neniigis. Ĉe la fino de 3-a jc. la cezaro Diocletianus konstruigis tute novan urbon kaj nomis ĝin: Herculia. En la 4-a jc. la venkintaj kristanoj konstruigis bazilikon kaj per muroj ĉirkaŭbaris la urbon. En la 8-a jc. ankoraŭ funkciis la episkopa preĝejo kaj la malmulta loĝantaro ĝisvivis la hungaran patrujokupon. Dum la turka regado ĉesis la vivo, la postsignon de la iama urbo kovris la herbaĉo. Nur dum la lastaj jardekoj la arkeologoj malkovris la ruinojn, kaj somere ofte okazas tie subĉielaj spektakloj – ordinare oni prezentas antikvajn teatraĵojn.

Dunaújváros. Nur dum la lastaj 30 jaroj naskiĝis la nuna granda socialista urbo sur la loko de la iama vilaĝo Dunapentele, kaj sur la ĉirkaŭaj maizokampoj. La nova urbo jam havas 60 mil loĝantojn kun grandegaj peza- kaj malpeza industrioj. Ĉe la Danubo en la industria haveno grandaj gruoj elŝipigas la karbon kaj ferercon por la ferfandejo. La moderna urbo havas ĉion, kio apartenas al la civilizo, sed samtempe ĝi konservis sian freŝon kaj junon. Abundas florplenaj parkoj kun buntaj floroj, sur la placoj estas belaj statuoj, troviĝas sportstadiono, amuzparko, bibliotekoj, ekspoziciejoj, kinejoj, diversaj lernejoj, eĉ teknika altlernejo.

La industrio de la departemento: 90% de la teritorio dum jarcentoj estis plugkampo, tial nur la agrikulturo kaj la manufaktura industrio evoluis. Post la unua mondmilito komenciĝis la kreskado de la grandindustrio kaj la mineksploato. Kelkaj ekzemploj el ili:

Danuba Feruzino (Dunai Vasmű). La 2-an de majo en 1950 komenciĝis la laboro apud la iama vilaĝo Dunapentele. En 1954 estis pretaj la unua altforno, la unua turbogeneratoro kun 21 megavata kapacito, la Danuba haveno kaj la unua Martin-ŝtalfabriko. La bazajn materialojn, la karbon kaj ferercon ni importas ĉefe el Sovetunio. La produktado de krudfero en 1978 atingis 825 mil tunojn. La fabrikado de la ferlada kaj fertuba materialoj jam okazas per malvarma laminatilaro en jare 480 mil tuna kvanto. La bazajn kaj duonpretajn materialojn uzas la en- kaj eksterlandaj fabrikoj kaj konstruentreprenoj. En la kombinato laboras 12 mil personoj, kiuj produktas ĉiujare valoron de pli ol 10 miliardoj da forintoj (ĉ. 300 milionoj da dolaroj).

Videoton. Tiu granduzino en Székesfehérvár estas mondfama entrepreno. Antaŭ la dua mondmilito en 1939 ĝi estis mituzino, kies 90% pereis dum la batalo. En 1955 komenciĝis la fabrikado de radioaparatoj kaj televidoj. La fabriko havas kunlaboradon kun diversaj landoj ekz.: la ĉeĥoslovaka TESLA, la sŏveta RUBIN ktp. Du trionoj de la produktoj estas eksportataj al diversaj partoj de la mondo. Bonkvalitaj estas ĝiaj koloraj televidoaparatoj. La fabrikado de komputiloj komenciĝis en 1971. En la fabriko laboras 20 mil laboruloj.

Ikarus. Kvankam la aŭtobusfabriko en Székesfehérvár estas filio de la Budapeŝta grandfabriko, tamen 50% de la aŭtobusoj ĉi tie produktiĝas. 80% de aŭtobusoj estas eksportataj, al ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio.

Baŭksit- kaj Karbonmineja Entrepreno. La minado de baŭksito komenciĝis en 1926 ĉe la vilaĝo Gánt. Nuntempe triono de la enlanda produkto, sume jare unu miliono da tunoj estas minata en la departemento. Krom la baŭksito la minejoj produktas kristalpuran akvon por Székesfehérvár. La karbonminado komenciĝis dum la 20-aj jaroj en diversaj lokoj. Ekde 1973 funkcias en la departemento pluraj minejoj, produktantaj karbon el la eocena epoko.

Kompreneble, en la departemento Fejér vivas ankaŭ esperantistoj, eĉ se ilia agado lastatempe ne havis specialajn kulminojn. La Departementa Esperanto-Komitato funkcias en Dunaújváros, sed troviĝas esperantistoj en ĉiuj signifaj lokoj de la departemento. La esperantista poeto Emeriko *Baranyai* (Emba) estas naskito de tiu ĉi departemento (li naskiĝis en la vilaĝo Alap.) Kaj laste ni menciu, ke en Székesfehérvár funkcias ankaŭ presejo: la ĉijaraj numeroj de HV presiĝis tie.

Szilárd *Bálint*

HUNGARAJ PROJEKTOJ EN LA PROGRAMARO DE TESCO

Scienca-teknika kunlaborado, delegado de ekspertoj, konsulta servo

TESCO nuntempe realigas 49 interŝtatajn priteknikajn kontraktojn de Hungario. Duflankaj laborprogramoj regulas la kunlaboradon kun kelkaj evoluantaj landoj kaj determinas la delegadon de hungaraj ekspertoj al tiuj landoj.

15 laborprogramoj estis asignitaj far TESCO en la jaro 1978, inter aliaj tiuj kun Algerio, Libio, Meksikio, Jamaiko kaj kun kelkaj landoj de Mez-Oriento.

La kompanio aŭspicias kelkajn oficejojn okupiĝantaj pri la lokaj teknikaj kaj sciencaj problemoj de la koncernaj landoj kaj prizorgas pri delegado de hungaraj specialistoj al tiuj landoj.

Filioj de TESCO funkcias en Algerio, Nigerio kaj Irako. Ĝis la fino de la jaro 1978 TESCO peris la konsultan agadon de 800 hungaraj ekspertoj en la evoluantaj landoj. Tiu ĉi nombro altiĝis je 900 en la jaro 1979. Samtempe en 1978 TESCO prizorgis pri instruado en Hungario de 1500 fremdlandaj studentoj kaj fakuloj.

En 1979 plejparto de la hungaraj ekspertoj laboris en Algerio, Irako, Nigerio kaj Libio. Kvinono de la ekspertaro laboris kiel kuracistoj aŭ sanitaraj laboruloj, 10 procentoj agadis kiel agrokulturaj specialistoj, 15 procentoj sur tereno de geologio kaj minotekniko, 20 procentoj okupiĝis pri konstruado de industriaj objektoj kaj 15 procentoj estis ekspertoj pri akvoprizorgado. Kelkaj hungaraj fakuloj agadis sur tereno de instruado en altlernejoj kaj universitatoj.

TESCO ankaŭ nuntempe delegas hungarajn ekspertojn kaj al okcidentaj kaj al evoluantaj landoj por kontrakti pri projektado de industriaj objektaroj kaj pri ekfunkciigo de diversaj teknikaj aparataroj.

Triono de la interrilatoj kun evoluintaj kapitalismaj landoj realiĝis en formo de kunlaborado por tria merkato. Sur kampo de teknologiaj prizorgadoj de ekfunkciontaj uzinoj TESCO kunlaboris unuavice kun firmaoj BABCOCK, GEA, RHEINHOLD kaj MAHLA, SIGENER AG ktp. Krome variaj projektaj laboroj kaj priteknologiaj kunlaboroj realiĝis en Algerio kun kompanioj FAMATEX kaj KIRCHFELD. Pasintjare TESCO kunlaboris en Libio kun firmaoj APEG kaj BABCOCK. La hungara kompanio kunlaboris pri muntado de ŝtalaj konstrueroj kaj pri elektrolizo de uzinoj de VÖEST ALPINE, WIENER BRUCKENBAU, BBC, ELIN UNION en Aŭstrio. La aŭstria firmao SIMMERING GRAZ PAUKER konstruis centralon en Tunizio kunlabore kun TESCO. Kiel subkontraktanto de tiu kompanio TESCO prizorgis pri rekonstruadaj laboroj de bierfarejo en Irako. Ĉi-tempe oni pritraktas kun italaj kaj svisaj kompanioj pri projektaj kaj ekfunkciigaj kunlaboroj realigontaj en triaj landoj.

En la jaro 1978 la plej granda interkomencado de TESCO en kategorio de evoluantaj landoj okazis en Algerio. La ĉefa kontrakto konsistis el 60 diversaj subkontraktoj. Pli ol 100 konstruinĝenieroj helpis la laboron de la konsulta oficejo de TESCO. La hungaraj ekspertoj laboris unuavice kiel projektistoj de publikaj konstruaĵoj, ŝoseoj kaj fervojoj.

Kelkaj grupoj de specialistoj laboris pri akvoprizorgadaj projektoj por Algerio. La valoro de kontraktoj de TESCO por tiu nordafrika lando dum du jaroj (1977-1979) altiĝis je 80 procentoj.

TESCO agadas en Libio ekde 1975 kaj tiu lando havas prioritaton en la merkato de la hungara kompanio. Oni kontraktis pri projektado de fervojlinio Sfax-Tripoli inter Libio kaj Tunizio. Krome — en 1978 — TESCO kontraktis kun la ministerio pri akvoaferoj de Libio pri projektado kaj teknika inspektado de akvoscienca esplora laboratorio kaj tiu de mezlernejo. La kosto de la TESCO-laboro atingis 1,5 milinojn de usonaj dolaroj. Krome kreiĝis favoraj cirkonstancoj por la hungara projektista agado sur terenoj de medicino, agrokulturo, transportado kaj akvoprizorgado.

Inter la evoluantaj landoj ankaŭ Nigerio havas prioritatan agadterenon por TESCO, ja ekz. en la jaro 1978 pli ol duobliĝis la valoro de la ĉi-rilataj kontraktoj. TESCO kunlabore kun KÖZTI (Hungario) agadas tie pere de ilia komuna inĝeniera konsultejo, funkcianta en Kano, en la norda parto de Nigerio. La hungaraj specialistoj projektas arkitekturajn kaj akvoprizorgadajn objektojn, krome okupiĝas pri planado de rekonstruado de urboj. En la lastaj jaroj TESCO partoprenis en kelkaj kartografiaj laboroj pri tiu tereno. Kunlabore kun okcidentaj kompanioj ankaŭ hungaraj fakuloj partoprenis en la muntado kaj ekfunkciigo de kelkaj oleo-kondukilaroj. Laŭ la ĉi-rilataj kalkuloj, la kompanio TESCO akiris ĉi-lande 30-procentan altigon de kontrakto-valoroj.

TESCO havas partnerojn ankaŭ en Suda Jemeno. Ĵus estis asignata kontrakto pri projektado de farmobienaj konstruaĵoj en la irigaciita agrokultura tereno de Wadi Meif'ah. Hungaroj projektas ankaŭ konstruaĵojn de unu 1700-hektara plantprodukta agrokultura entrepreno. Hungaraj projektistoj partoprenas ankaŭ aliajn laborojn, koncernantaj agrokulturon. Oni jam priesploris ĉi-tiun terenon kaj la ĉi-rilataj dokumentoj estas kompilitaj.

La hungara projektista laboro startis en Kuvaito en la jaro 1978. TESCO planas pliampleksigi ĉi tiun kontakton ankaŭ ĉi-jare.

TESCO ORGANIZO pri INTERNACIA TEKNIKA kaj SCIENCA KUNLABORO
Hungario/Budapeŝto
H-1054 Budapest, Rosenberg hp. u.21.
Koresponda adreso: H-1367 P.O.B. 5/101
Telekso: 22-4642 Telefono: 100-850
Telegramo: TESCO-Budapest

Margit Kaffka

Peĉjo ekiras

Du silurbuŝaj, etaj strangaĵoj,
grotcskaj, karegaj infanŝuoj,
en ĉambro malnova ĉarme paŝadas,
hezite, lante kun dolĉaj bruoj.
En mi vekiĝas ĝojo enkora,
neĝblanka florpluvo tuj min enkaŝas,
kiam mi vidas, el mi la rido
ne elteneble, nepre elpaŝas.
Sur olda skribo, malnova briko
lumo pulsanta strange ekbrilas.
Kaj en mi sonas kria muziko:
– Vidu! Miraklo! Peĉjo ekiras!

Li premas forte la tablopiedon
kaj ruĝiĝante la buŝon malfermas.
Kun ardega volo kaj homa febro
ĉi rozoburĝono ekstari lernas.
Nun! Ĝin forlasas, pluen ekiras...
Kiel stumbladas ĉi revadulo!
Top, kop! Paŝante ofte ekhaltas,
iras li brave kaj sen skrupulo.
Jam tuj alvenos! Per mano ekzaltas.
– „Nur lante, pripense sen obstino! "
Forfali ne povas, – sed urĝe saltas, –
kaj li jam estas en mia sino.

Plaĉe li ludas, ni ree komencas.
Mi apudiras kun pacienco.
Li paŝus longan, volus min kapti
kaj renversiĝas ĉe la komenco.
La buŝo tremas plori li volas,
ĉu ĝin rimarkas eble iu?
Li pripensadas... poste leviĝas,
ke nove provu kaj paŝi sciu.
Li ree, brave antaŭiĝas.
„Top, kop", resonas jen paŝo lia,
softe, balbute sin kuraĝigas:
– „Nur lan-te! Pri-pen-se! Fi-lo mia! "

Mi lin rigardas kun vido malhela,
nuba revado en min sin kroĉas.
... La jaroj pasis ... Mi maljuniĝis
kaj izolite, tutsola loĝas.
Kelkfoje sonas fortegaj paŝoj;
venas junulo, juna bravulo.
„Ĉu vi? Kion mi nun donu al vi? "
Top, kop. Hezitas mi, maljunulo.
Dum li parolas vigle, junece,
– La tuta vivo estas lia!
Tremante, flustre mi diras dece:
„Nur lante,
nur lante, pripense, filo mia! "

El la hungara: Tibor *Bessenyei*

Dezső Kosztolányi

AURELIUS

Frumatene maljuna sinjoro rapidis supren sur la ŝtuparo de la imperiestra palaco. Li portis ruĝajn ŝuojn kun kvar ledrimenoj, kun duonlunformaj eburaj bendornamaĵoj. Estis larĝa purpurbendo[1] sur lia tuniko. Sur lia fingro ringo el oro.

La gvardianoj vidis, ke li estas senatano. Ili enlasis lin senvorte.

Aurelius ellitiĝis jam antaŭlonge. Ekde aŭroro li skribis, ne lavinte sin, kun hirta barbo. Li surhavis sole tunikon senmanikan, kiel simpla metiisto.

Li enlasis la alveninton antaŭ sin, svingante sian nudan brakon je saluto.

Marcellus ekscitite parolis:

– Helpu min, Cezaro.

– Kio okazis?

– Mia filo malaperis.

– Ĉu Avidus?

– Li, Cezaro, mia dekkvarjara filo. Lastan fojon ni vidis lin hieraŭ matene. Li jam eĉ ne tranoktis hejme. Ĵus mi aŭdis en la forumo, ke la patrolo vespere portis lin en la prefektejon.

– Ĉu vi estis tie?

– La komandanto ne volas ellasi lin.

– Sed kion li faris?

– Eĉ konjekton mi ne havas. Helpu Marcus Aurelius. Lia patrino ploras. Sendu al ni hejmen la etan Avidus-on.

Tiutempe regis kaoso en Romo post la inundo de Tibero, akrid-invado, pesto, post la militiroj kontraŭ la kvadoj kaj markomanoj[2].

Marcellus petege fiksis siajn miopajn okulojn al la imperiestro. Tiu rigardis sian maljunan amikon. Trankviligis, ĉirkaŭpremis lin, poste lasis lin foriri.

Li avizis la komandanton de la noktogardistaro. Centuriestro rapidegis urĝege al li.

– Kio okazis?

– Vespere ĉirkaŭ la naŭa – raportis la centuriestro – en la ĉirkaŭaĵo de la templo de Mars Ultor[3], en tiu mallarĝa strateto, kie loĝas ankaŭ suspektindaj sorĉistoj kaj idoladorantoj – estiĝis bruo. La patrolo kaptis junulon. Li ŝajnis deksesjara.

– Dekkvar.

– Li tenis en la manoj birdon, monedon. Kvin-ses buboj postkuris lin. Ili volis forpreni ĝin de li. Li ne lasis. Tiuj ŝrikadis: „stelisto, ŝtelisto."

– Ili ludis.

– Certe. Sed en mallumo, en polvo, en bruo maleblis orientiĝi. Estiĝis tumulto. Jam hurlis ankaŭ la plenkreskuloj. La patrolo ricevis ordonon interveni. Ĝi ĉirkaŭis ilin. La knabo plengorĝe kriegis, interbatalis, kontraŭstaris. Fine oni portis lin en la gardistejon.

– Liberigu lin.

– La knabo – daŭrigis la centuriestro la parolon pli lante – montris tiel arogantan sintenon, ke unu el la gardistoj – Sextus – devis uzi sian lancon.

– Ĉu ĉi tiu vundis lin?

– Jes.

– Kie?

– Sur la verto. Post noktomezo mi inspektis la gardistaron. Tiam li jam kuŝis svene sur la tero. Li perdis multe da sango. Mi lavigis lin. Mi mem kuŝigis lin sur tabulliton. Ĉirkaŭ tagiĝo li mortis. Li estas en la prefektejo. Du gvardianoj gardas la kadavron.

Aurelius retropaŝis. Li pensis pri Avidus, pri la eta Avidus, pri la patro kaj patrino, kiuj atendas lin hejmenveni. Lia vizaĝkoloro ŝanĝiĝis. Sed li regis sin. Li sentis: „la mondo estas fumo kaj nebulo."

Kun trankvila riproĉo li ĵetis vorton al la centuriestro:

– Ĉu tiaj estas viaj homoj?

Tiu ne respondis, atendis la ordonon de la imperiestro.

Aurelius rigardis la teron kaj diris:

– Kie estas tiu gardisto? Mi volas vidi lin.

Tri soldatoj enkondukis lin rapide. Lancon li jam ne havis. Oni senigis lin de ĝi, kiel krimulojn, baldaŭ ekzekutotajn.

Sextus estis giganta junulo. Li surhavis ĉapelon, kamizolon el ledo. El la ledkamizolo elpendis liaj nodozaj artikoj. Rigide li staris antaŭ la imperiestro.

–Ĉu estis vi?

– Mi – li diris metalvoĉe.

– Pro kio vi faris?

– Ĉar li baraktis.

– Ĉu vi scias, ke vi agis malhome kaj maljuste? Ĉu vi scias kio vin atendas?

– Mi scias.

Sextus antaŭnelonge vidis, kio atendas la romian soldaton kiu faras krimegon. Oni enkondukas lin en la korton de la kazerno. La centuriestro donas signon, la solduloj ĵetas sin sur la punotan soldaton, batas lin per stangoj, ŝtonoj, nodbastonoj ĉie kie ili atingas lin ĝis kiam tiu elspiras la animon. Lastfoje ankaŭ li mem per lanco frakasis la kapon de tia kondamnito.

Malgraŭ tio eĉ la palpebroj ne ekvibris, kiam oni forkondukis lin.

La centuriestro restis por preni la disponon koncerne la punon.

Aurelius rigardis al li. Per tute alia, familiara voĉo alparolis lin:

– Kia estas tiu soldato?

– Eminenta – respondis la centuriestro –, mia plej bona homo – poste aldonis: – li estis. Li trabatalis ĝisfine la militiron kontraŭ la kvadoj.

Aurelius faris geston de bedaŭro. Poste li levis la ŝultrojn. Tio estis la ordono.

La centuriestro turnis sin sur la kalkanoj, ekiris. Tiam la imperiestro mansignis revoke.

– Riproĉu lin – li diris. – Parolu kun li, komprenigu, ke tio estis malĝusta kaj alifoje ĝi ne okazu. Sed ne suferigu lin. Lasu lin libera.

Kiam la centuriestro foriris, Aurelius fermis siajn okulojn. Li havis kapturnon pro la malgajo kaj naŭzo.

– Kion mi mensogos al la gepatroj? – li pensis. – Ve, kiel aĉa estas la vivo. Nu, egale. Ĉio forpasos, ĉion ili forgesos.

Dum li tiel hezitadis meze de la ĉambrego, junulo proksimiĝis al li – pala, razita junulo, kiu ĝis nun sidis en la angulo. Tiu estis Commodus, lia plej aĝa filo. Aurelius lastatempe tenis lin apud si, por inici lin en la sekretojn de la regado.

La maldikajn lipojn de la junulo krispigis rideto. Lia patro antaŭ jaroj en Panonio, sur la bordo de la rivero Garam rekte por li notis siajn majestajn, afablajn pensojn pri la homamo kaj indulgo. Nun malica ĝojo juktiklis lian bruston, li kaptas ĉe mensogo ĉi tiun asketan, bronzbarban stoikulon, ĉi tiun neelteneble perfektan duondion.

– Tiun do vi eĉ ne punas? – li demandis.

– Ne – diris Aurelius, ankoraŭ nun en ekstazo de la meditado, eĉ ne malfermante siajn okulojn. – Tiu stulta bruto estas senkulpa, ĉar li estas tia, kia li estas. Ankaŭ la viktimo estas senkulpa, la kompatindulo. Aŭ vi kredas, ke oni povas ripari eraron farante alian eraron?

Nun li malfermis siajn okulojn. Krude, malvarmtone li daŭrigis:

– Se mi forprenus la vivon de tiu malfeliĉa bubo, kiu finfine plenumis sole sian devon, mi farus eraron eĉ pli grandan, ol la lia, ĉar per tio mi neus la principon de la ŝtato en ĝia fundamento, mi ŝancelus la fidon de la ceteraj solduloj kiuj obeas la ordonojn, mi iĝus kooperanto, komplico de tiuj renversuloj, kiuj per devizoj, enportitaj el Oriento, per idiotaj fabeloj transplantitaj el Egiptio, atakas la ordon, racion, latinan belon kaj klopodas, ke ĉi tie anstataŭ lumo regu mallumo kaj kaoso; anstataŭ saĝuloj juĝu malkleruloj kaj malpuruloj. Terurajn tagojn ni travivas, filo mia. La mondo krakadas ĉe la juntoj. Ni devas savi ĉi tiun mondon, tiun grandan kaj belan mondon, kiu tra tiom da jarcentoj brilis per siaj saĝuloj, oratoroj, poetoj, kaj nun ruliĝas al la mallumo. Forton ni bezonas, forton. La forton ni prenas, de kie eblas: de la naturo. Ankaŭ tiu gardisto estas blinda forto de la naturo. Li estas instinkte kruela kontraŭ ĉiu, kiu rezistas al li: sur la batalkampo kontraŭ la kvadoj, ĉi tie en la lando kontraŭ la perturbantoj de la ordo, volantaj detrui kion ni konstruis. Nun li agis brutale kaj malsaĝe. Sed kiom da bono ĝis nun li faris per tiu sovaĝeco kaj kiom da bono faros ankoraŭ en futuro, kiam samtiel sovaĝe li ĵetos sin sur la krimulojn, ŝtelistojn, murdistojn, sur la Hindiajn gimnosofistojn[4], kiuj estas malamikoj de ni ĉiuj. Ĉu vi vidis kiel li iris renkonte la morton sen malfermi la buŝon? Ĉu vi vidis kiel ĉioriska li estas? Ĉu vi vidis lian mallarĝan frunton, ostozajn manplatojn, stultajn peĉonigrajn okulojn? Ĉu vi do kredas, ke li plenumas servon por tiuj kelkaj aĉaj solde ricevataj sestercoj[5], kaj ne por tiu terura plezuro, ke li furiozu kaj tretu, ke li kruele vangofrapadu la kaptitojn, ŝiru ties orelojn sangaj, ke li kruele turmentu laŭplace ĉiun, kiun – hodiaŭ pro tio, morgaŭ pro alio – oni prenas kaj prenos pekulo? Propre tio estas lia salajro. Certe li estas cerbmalsana. Pro tio li estas tiel fidinda. Sed ankaŭ la babilonianoj, persoj, helenoj – eĉ la delikataj helenoj – utiligis tiajn demenculojn por la propraj celoj en intereso de iu imagita bonego, kaj tion faris senescepte ĉiu popolo, ĉiu epoko, ĉiu imperio, ĉiu respubliko. Kial vi kuntiradas la nazon? Ĉu vi naŭziĝas pro tio? Mi eĉ pli naŭziĝas, filo mia. Ni, kiuj pensadas kaj sentas, forturnas nin de tiaĵoj. Sed domaĝe, ni bezonas tion. La kvieton kaj sekurecon, devenantajn el tio, ni ĉiuj akceptas kaj ĝuas. Do ni ne rajtas malestimi tion. Ĝi estus hipokritado, aĉa orienta hipokritado. Ni povas esti puraj nur dum ni ludas per la pensoj. Tuj, kiam ni tuŝas la vivon, ni estos plenaj de abomena kontraŭdiro de la vivo, kaj la manojn kovros sango, kovros koto. Mi devas akcepti tion, ĉar mi regas, kaj baldaŭ devos ankaŭ vi, mia filo. Malĝojige, ke la homa naturo estas tia, sed tia ĝi estas. Ŝajnas, sur tiu ĉi tero sole frenezuloj povas subteni la ordon inter la sanmensuloj.

El la hungara: D-ro Tihamér *Kiss*

Notoj:

1. Purpurbendo: distingilo de senatanoj.
2. Markomanoj: tiamaj apudlimaj gentoj, invadantaj la teritorion de Panonio.
3. Mars Ultor: Marso la Venĝpunanto.
4. Gimnosofistoj: joganoj.
5. Sesterco: etvalora monero el arĝento = 2 1/2 as-oj.

EL „TUTMONDA SONORO"

Walter von der Vogelweide

Sub la tilio

Sub la tilio
la lokon, kie
mi sidis kun la kortrezor':
vi trovos per tio,
ke estas tie
rompitaj nun la herb', la flor'.
Ĉe l' arbaro, en la val',
tralala hej!
Dolĉe kantis najtingal'.

Mi alrapidis
tra l' kamp' junia,
li jam atendis tie min,
akcepte alridis;
lin vidi: kia
feliĉo, ho Ĉielvirin'!
Ĉu li kisis? Horon! Pli!
Tralala hej!
Eĉ nun brulas buŝ' al mi.

Ni metis lerte
el fasko flora
kuŝejon kun ŝercema ĝoj'.
Rigardos ĝin certe
kun rid' elkora,
kiu trairos sur la voj':
vidos sur la flor-kanap',
tralala hej!
Kie kuŝis mia kap'.

Se scius iu,
ke li ĉerestis
longe, mi svenus pro l' hontem'.
Neniu ja sciu,
kion ni estis
farantaj, krom li, kaj mi mem,
kaj krom eta kantbirdet'.
Tralala hej!
Ĝi silentos pri l' sekret'.

El la germana: Kálmán *Kalocsay*

Jarcentoj de la hungara literaturo

István Torda

13. Interepokaj pontoj

En la lasta seriero, koniginta la „popolajn" verkistojn, jam temis pri kelkaj, kies karieroj komenciĝis multe antaŭ la dua mondmilito, kaj daŭris plu post 1945, en la cirkonstancoj de la nova hungara socio. Ankaŭ ĉi-kaze estos konigataj tiaj verkistoj, kies karieroj pontas kelkajn epokojn. Ili ĉiuj estas gravaj personoj de la hungara literaturhistorio.

Jenő Heltai (1871–1957) jam en la jarcentŝanĝo vokis al si la atenton per poeziaĵoj, en kiuj sonis sentemo kaj facilanimeco de moderna junulo. Herooj de liaj humurplenaj romanoj, verkitaj poste, estis aventuristoj maldanĝeraj, bohemuloj de Budapeŝto kaj tiuj de Parizo, la verkisto rikoltis sukcesojn ankaŭ per lirikplenaj teatraĵoj romantikaj. En la malfrua liriko de Heltai eksonas la turmentoj, suferitaj dumfaŝisme kaj dummilite. Li rememoris la junaĝon kaj kantis pri la doloroj de la maljuno.

La vivo kaj verkado de la mondfama dramverkisto hungara, *Ferenc Molnár* (Molnar) formiĝis malregule. Dum la disvolviĝo de la faŝismo li elmigris unue al Francio, poste al Svislando kaj fine al Usono. Sed la plejparto de liaj dramoj, verkitaj eksterpatrie, havas agadon okazantan Hungarlande. Li sciis ĉion pri la leĝoj scenejaj. Li ellernis la perfektan teknikon de la francaj tezdramoj, same la formadon de strecite densaj dialogoj en la anglaj komedioj. Li ne timis eliri el absurdaj ideoj, sed kun preskaŭ klasikisma modero detenis sin disde la troigoj. Ĝuste tial fariĝis ĉiu lia absurdo iuspeca simbolo subtila. Junaĝe, kune kun pluraj realismaj noveloj li verkis ankaŭ unun el la plej belaj porjunularaj romanoj: *La Knaboj de la Paŭlostrato* (1907). (Esperantigis L. Spierer Somlai.) /Ĝi aĉeteblas ĉe HEA kaj UEA. Red./

Al la konsekvence maldekstraj „popolaj" verkistoj apartenis *József Darvas* (Darvaŝ) (1912–1973). En la romano *Ekde Epifanio ĝis Silvestro* (1934) (Esperante: *Amara Pano,* tradukis L. Somlai – Red.) kampulodunglaboristo rakontas unu jaron de sia malfeliĉa vivo kaj pere de tio la leganto ekkonas la socian strukturon de vilaĝo, situanta en la Hungara Ebeno. La verkisto en la sociografiaĵo, titolita *La Plej Granda Vilaĝo Hungara* (1937) priskribas kronikon de sia naskiĝurbo Orosháza. La romano de Darvas *Urbo Surmarĉe* (1945) estis la unua libro, kiu artisme montris la tragedion de Hungario, puŝita en faŝismon, kaj ĝian liberigon. La plej grava verko de la malfrua periodo de Darvas estas la romano *Ebria pluvo* (1963), pentranta drameskan bildon pri la historio de du jardekoj kaj pri la kialoj de la okazintaj eventoj.

La lastaj mohikanoj de «Nyugat»

Al la tria generacio de la revuo „Nyugat" apartenas *Endre Illés* (Illeŝ) (1902), kiu longtempe estis konsiderata de la legantaro kritikisto kaj eseisto, kvankam lia agado kritikista nedisigeble kunfandiĝis kun la beletrista. Liaj fruaj noveloj donis imagon pri sencela vivo sintrompa en la komfortaj domoj de la elitaj distriktoj de Budapeŝto. Tiujn ĉi verkojn karakterizas malvarma sinteno kaj precizo en la prezento de la realo. Pli novaj rakontoj de Illés parte revokas la pasinton, parte okupiĝas pri karakterizaj konfliktoj de la nova socio. La verkisto havas grandajn meritojn en la formado de la moderna dramo hungara. La herooj de liaj teatraĵoj estas diversaj tipoj de la intelektularo.

La poemoj de *Zoltán Zelk* (1906) aperintaj en la 30-aj jaroj atestis pri poeto de la skolo de „Nyugat". La funda koloro de la mondbildo de Zelk estis deprima sento, nutrata de malriĉo kaj de la ekstera mondo, iĝanta pli kaj pli brutala. Li estis inter la unuaj poetoj, prikantintaj la travivaĵojn de la liberiĝo. Li sincerkore poemis pri la vivŝanĝoj, sed la skemismo, disvolviĝinta dum la personkulto, malaltigis ankaŭ la nivelon de lia liriko. En 1956 li miskomprenis la esencon de la kontraŭrevoluciaj eventoj. Pro la tiutempa agado li estis enprizonita. Zoltán Zelk poste komprenis sian eraron. Liaj poemoj, verkitaj post 1956 estis plenaj de profunda, pura tristo de malfeliĉa homo. La pinton de sia verkado Zelk atingis per siaj lastaj volumoj, en kiuj aperas poeziigo de la maljuniĝo, tiu de la malsano. Ĉi tie li trovis sian veran voĉon.

Miklós Szentkuthy (Sentkuti) (1909) ricevis la kromnomon „la hungara Joyce". Cetere ĝuste li tradukis brile la faman romanon *Ulysses.* Lia kariero komenciĝis kun granda interesiĝo kaj parte konsterno ĉe la legantaro. En tiu junaĝa verko, *Prae* (1934) li uzas teknikon de la asociado libera. La sama libro montras la eksterordinaran erudicion de la aŭtoro. Lastatempe li verkas biografiajn romanojn.

En la unuaj poemoj de *István Vas* (Vaŝ) (1910) estis sentebla influo de la avangard-movado. Poste li konscie daŭrigis la tradicion. Li strebas sintezi la intelekton kun la maltrankvilaj sentimentoj de la moderna homo. Ĉefan karakterizon de lia poezio prisocia formas la enlirikigo de historiaj motivoj. En la lastaj jaroj li aperigis sian aŭtobiografion, verkitan en intereskapta, majstra prozo. La riĉan arttradukistan verkadon de Vas reprezentas lia antologio *Kanto de Sep Maroj.*

György Rónay (Ronai) (1913–1978) same estis brila tradukisto. Kiel originala poeto li reprezentas la novkatolikan lirikon. Post lia morto, en 1978 aperis lia romano *Pantero kaj Ŝafido,* eble la plej elstara libro, montranta la atmosferon de la personkultaj tempoj.

La trian generacion de la Nyugat-poetoj apartenas ankaŭ *Sándor Weöres* (Vereŝ) (1913). Li estis preskaŭ infano, kiam aperis liaj unuaj poemoj. Jam tiam evidentiĝis, kia majstro de la poeziaj formoj li estas. Li strebas formi absolute individuan mondon poezian. Weöres serĉas la kernon de la „rompita realo". La percepteblan mondon li rekonas nur kiel relativeskan spegulon de la esenco. En siaj sintezaj poemoj li celas montri la tutan mikrokosmon, kaj pretekste de la plej simplaj fenomenoj li enpoemigas la tutan cirkuladon de la vivo. Li elkovris antaŭe nekonatajn eblojn de la hungarlingva verskreado. Aro de liaj koloroj kaj bildoj estas senkompara. Same senparas lia forto etos- kaj mitkrea.

Lia poemciklo *Psiha,* verkita dum pluraj jaroj, ĝis 1972 transformiĝis iuspeca versromano. En poemoj, troveblaj en tiu ĉi unika verko, la poeto „surprenis la haŭton" de elpensita poetino pasintjarcenta.

József Darvas, prezidanto de la Asocio de Verkistoj parolas okaze de la 8 a Hungara Packongreso en la Parlamentejo (1973)

György Rónay

György Aczél, vicprezidanto de la registaro kaj Imre Pozsgai, ministro pri kulturo salutas Zoltán Zelk okaze de lia 70a naskiĝtago en 1976

Sándor Weöres havas grandajn meritojn en la kreado de tia „porinfana" literaturo, kiu pro ĝia alta nivelo estas ĝuebla por ĉiuj generacioj. (Legu specimenojn en la kolekto *Hundbazaro,* mendebla ĉe HEA kaj UEA. – Red.) Li estas ankaŭ el la elstaraj hungaraj poezitradukistoj.

«Respondo»

József Lengyel (Lendjel) (1896–1975) en 1919, dum la 133-taga Hungarlanda Konsilia Respubliko aktivis kiel komunista ĵurnalisto. Pro tiu ĉi agado li devis poste elmigri. Li vivis komence en Vieno, poste en Berlino. En 1930 jam en Moskvo aperis lia libro *Visegrádi-strato.* Tiu ĉi verko estas aŭtentika kroniko pri la preparado al la hungara revolucio. En 1938 li estis senbaze kondamnita, poste ekzilita al Siberio, en 1955 rehonorigita, kaj en la sama jaro li revenis al Hungario. József Lengyel per sia malfrua prozo aliĝis al la plej elstaraj verkistoj de la nuntempa literaturo hungara. Temaron de lia verkado formas iamaj luktoj de la Hungarlanda laborista movado, sed ricevis en ĝi lokon ankaŭ la nuntempo. La plej altnivelaj el liaj noveloj estas tiuj, kiuj montras la homecon kaj la fidelon al la altaj principoj, konservitaj ankaŭ en la suferplenaj tempoj personkultaj. (Vd. specialan numeron 1976/1 de HV.)

Unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la moderna prozverkado hungara estas *Tibor Déry* (Deri) (1894–1977). Lia verko *La Nefinita Frazo,* kiun li ekverkis en 1933 kaj finis nur post 1945, estas la unua hungara romano, kiu strebas montri la socian realon de la 20. jarcento kaj samtempe aperigi la mondon de la moralo. La esenco de la agado estas, ke junulo el grandburĝa familio, malkonkordinte kun siaj parencoj kaj amikoj, trovas la vojon al la neleĝa komunista partio. En la kadroj de tiu historio Déry skizas la moviĝon de ĉiu socitavolo.

La agado de la plej grava Déry-romano, tiu de *Respondo* (1950–1952) iras duvoje. La unua fadeno de la agado estas vivo de juna laboristo, la alia – sorto de universitata profesoro. La verko montris denove bildon de la hungara socio intermilita. La dua volumo de la romano elvokis furiozan atakon far la oficiala literaturpolitiko de la 50-aj jaroj. Tiu politiko postulis – kompreneble ne rekte – la skemismecan idealigon. En la sama jardeko la novelista verkado de Déry atingis sian apogeon. El lia psikoanaliza majstroverko *Amo* (1956) estis farita mondfama filmo. (Esperante en 1974/5 de HV.) Tibor Déry pro la rolo, ludita en la 1956-jara kontraŭrevolucio, estis enprizonita. Li liberiĝis en 1961. La postan periodon de lia verkaro karakterizas parabolesko, delikata ironio kaj la pli kaj pli evoluanta stilmajstreco. La verko *S-ro G.A. en X* (1964) estas groteska utopio Ĝi esprimas rifuzon de du ekstremoj: tiun de la absoluta libero kaj tiun de la humiliga subpremo. Alia Déry-romano, havinta tuteŭropan sukceson titolitas *La Anatemanto* (1966). Ĝi estas filozofia verko pseŭdo-historia. En la vivo de Sankta Ambrozio la verkisto trovis eblon por koncepti la ĉiam aktualajn problemojn de la individuo kaj la komunumo, tiun de la kredo kaj la dubo. La aŭtobiografia romano de Déry *Jugo Mankas* aperis en 1969. Ekde 1971 ĝis la morto li kreis tutan aron da etromanoj: *Imagita Riporto pri Usona Popfestivalo* (1971), *Kara Bopeer'...!* (1973), *Unuorelulo* (1974), *La Murdisto kaj Mi* (1975). Ĉiuj ĉi estas intelektaj „majstro-ludoj" de maljuna verkisto.

László Benjámin (1915) ekverkis, kiel ano de batalema, kontraŭfaŝisma grupo de laboristaj verkistoj. Ĉe malmultaj poetoj oni trovas la sentojn pri la subpremiteco kaj senelireco esprimiĝi kun tiom da forto, kiel ĉe li. En tiuj poemoj, verkitaj en la 30-aj jaroj, samtempe aperis inklino al la suferplena moralemo. Post la dua mondmilito Benjámin kun sincera entuziasmo aliĝas al la adeptoj de la nova ordo socia. Lia liriko, plena de ardo, malfermanta vastajn perspektivojn, iĝis elstara reprezento de la hungara poezio socialisma. Post 1953 la gravaj eraroj politikaj far la gvidantoj en la antaŭaj jaroj el la Benjámin-a poezio denove elvokis la voĉon de moralema memanalizado. La humanisma tendenco de tiu ĉi liriko eĉ tiam ne malfortiĝis. En liaj pli novaj poemoj ĉiam pli sonas la postulo pri la batalado porbona, pri la fidelo al la altaj idealoj.

István Vass, Endre Illés, kaj István Simon

Sándor Weöres kaj lia edzino Amy Károlyi, poetino, dediĉas siajn librojn en librovendejo en la tago de poezio (11. apr.)

El la hungara: *P.A.R.*

malpliigas
elfalon,
stimulas
kreskadon
de haroj
HERBÁRIA
LIKVAĴO
BÁNFI
Bánfi
HAJSZES
Bánfi
HAJSZESZ

József Bényei

Oldaj tri paŝtistoj

(Dediĉe al Sándor Szücs)

Oldaj tri paŝtistoj
decidis pri faro
ekiris por serĉi
birdon de branĉaro

birdon de branĉaro
de la arbo frukton
de la vastaj kampoj
la trezor-produkton

Oldaj tri paŝtistoj
post tri tagoj murojn
atingis ĉe l' urbo
havanta sep turojn

Diris la plej juna:
– Haltu ni ĉe korto
domoj nin vokadas
kun aperta pordo

kie multaj vivas
ni ricevas panon
akvo de la lumoj
donos al ni banon.

Ekparolis meza:
– Nin rostaĵo franda,
kukodor' invitas
kaj kamen' fumanta

urĝas la decido
ĉu por ĉiam resti
tie ĉi aŭ nure
nin por nokto vesti

Diris la plej olda
per fingruma movo
silk' de lia barbo
har' de ora bovo:

– Haltu ni nun, haltu
pri enir' decidi
kaj unu l' aliajn
lastan fojon vidi

Tura sonorilo
se trifoje muĝos
trans marmorajn pordojn
stepa vent' ne fuĝos

Oldaj tri paŝtistoj
adiaŭon diris
iris du en urbon
stepon unu iris

Oldaj du paŝtistoj
vagis en ŝtonaro
al la stepaj ventoj
tur' fariĝis baro

Al ili ledŝuoj
pro ŝtonaro likis
pordo kaj fenestro
hom' ilin eligis

Oldajn du paŝtistojn
kiam mort' aliris
ili eĉ tombkavon
por si ne akiris

Belabarba viro
el triop' la lasta
iris for al valo
verdaŝultra vasta

Lia lit' – herbaro
nub' fariĝis mato
kvazaŭ li ja estus
por la birdoj frato

Lian oran barbon
vento disen lanĉis
el la polma pelvo
kapreoloj manĝis

Kaj trian paŝtiston
kiam trafis fino
pluv' lin enterigis
ĉe l' pied' de pino

Super kor' belega
kreskas flor' de pompo
kaj silent' eterna
regas ĉirkaŭ tombo

Oldaj tri paŝtistoj
iri for decidis
oldaj tri paŝtistoj
jen kiel orbitis

Trad. Tibor *Papp*

Libroprodukto 1980

Jen nia kutima statistiketo pri la Esperanta libroeldonado dum la lasta jaro. Restas kutima ankaŭ la baza principo: ni konsideris tiujn librojn, pri kiuj aperis informo dum la jaro 1980 en la rubriko „Laste aperis..." de Esperanto, sendepende de tio, kiun eldonjaron portas la koncerna eldonaĵo.

	1975	1979	1980
Nombro de ĉiuj libroj en kaj pri Esperanto	90	160	132
Suma paĝonombro de tiuj	8928	17407	15091
Nombro de originalaj beletraj verkoj	9	14	16
Suma paĝonombro de tiuj	946	2530	1990
Nombro de beletraj tradukoj	14	98	27
Nombro de nefikciaj verkoj	52	63	53
Suma paĝonombro de tiuj	5339	6902	5637
Nacilingvaj verkoj pri Esperanto kaj lerniloj	15	45	36
Meza paĝonombro de Esperantaj libroj	115	109	114
Meza prezo de Esperantaj libroj (en ned. gld.)	6,–	10,42	11,40

Bedaŭrinde, mankas indikoj pri la eldonkvantoj, sed verŝajne ordinara Esperanta libro aperas nur en 1000 ekzempleroj aŭ malpli. Karakteriza informo ĉi-koncerne aperis en la n-ro 2/1981 de Esperanto: oni jubile informas, ke la dua eldono de „Kredu min, sinjorino! " vendiĝis dum ses jaroj en 2300 ekz., kaj la maldeceta anekdotaro „Kruko kaj Baniko el Bervalo" dum dek jaroj en 1760 ekz. Ĉu tiuj ciferoj prezentas kaŭzon por ĝoji?

Vilmos *Benczik*

Georgi Mihalkov

La sinjoro instruisto

Subita sonoro trancis la silenton en la domo, kaj Marina rapide iris malfermi la pordon. Estis poŝtisto, maljuna viro, kiu eble de antaŭnelonge laboris en ilia kvartalo, kaj ŝi por unua fojo vidis lin.

La poŝtisto donis al Marina telegramon kaj petis ŝin subskribi la ricevatestilon. Al Marina ŝajnis, ke ŝi jam aŭdis iam lian voĉon kaj ŝi pli atente alrigardis lin. Li estis eble pli ol 60-jara, kaj lia maldika korpo kvazaŭ perdiĝis en lia larĝa poŝtista uniformo. De daŭra irado liaj nigraj ŝuoj estis frotitaj, sed de lia blanka kiel neĝo ĉemizo oni povis eksenti agrablan freŝan odoron de akvo kaj sapo.

Sed Marina tute konsterniĝis kiam pli bone ŝi vidis la okulojn de tiu ĉi maljuna homo kaj ŝi jam estis certa, ke ŝi konas lin persone kaj bonege rememoras liajn kolombkolorajn helajn okulojn.

Ŝi preskaŭ forgesis pri la telegramo, per kiu ŝia kuzo invitis ŝin ĉeesti lian edziĝfeston. Ŝi mallaŭte diris „ĝisrevidon" al la poŝtisto, fermis la pordon kaj apogis sin sur la muro, kvazaŭ nehavanta spiron. Nur ŝiaj lipoj malklare ekflustris: „Sinjoro instruisto..."

Mola nebulo vualis ŝian rigardon kaj ia nevidebla mano malrapide trafolumis la albumon de ŝiaj rememoroj.

Antaŭ tridek jaroj ŝia naskurbo, kuŝanta ĉe la mara bordo, similis al olda traborita boato, forgesita de ĉiuj. Nur somere sur la krutaj urbaj stratoj kaj sur la mola ora sablo de la strando oni povis vidi kelkajn fremdulojn. Sed aŭtune kiam fridaj ondoj inundis la plaĝon kaj frostaj ventoj ekblovis de la maro, la urbeto kaŝis sin timeme malantaŭ la nigraj akraj rondoj ĉe la bordo.

Malplenaj staris la tabloj sur la urba fiŝbazaro kaj tie jam ne promenadis kaj ne zumis la bunta homamaso kiel dum somero. Sur la silenta kaj senhoma placo la vento pelis kolere malpurajojn kaj paperojn. Nur la hurlo de la maraj ondoj senlace ekhis sur la stratoj kaj en domoj, kie regis la enuo kaj la monotono.

Sed en unu septembra tago la rulbruo de nigra faetono rompis la silenton de la urbo kaj vekis novajn sentojn en Marina.

En la provinca mara urbo alvenis nova instruisto de literaturo.

Marina bone rememoris la aŭtunan tagon kiam la nigra faetono haltis sur ilia strato proksime de ilia domo, kaj el la faetono malsupreniĝis juna eleganta viro La nova instruisto luis ĉambron en najbara domo.

Tiam Marina estis lernantino en la dua klaso de la gimnazio, kaj kiam la nova instruisto eniris por la unua lernohoro en ilian junulinan klason, la knabinoj apenaŭ premis siajn mirkriojn.

La nova instruisto estis svelta ĉirkaŭ 30-jara viro kun densa bukla hararo, nigra kiel korva flugilo kaj kun helaj kolombkoloraj okuloj. La blanka ĉemizo kun ĉerizkolora kravato kontrastis al lia bruneta, glate razita vizaĝo.

— Mia nomo estas Gorov — diris simple la nova instruisto kaj demandis pri la temo de ilia lasta leciono.

Post la fino de la unua lernohoro, lia voĉo longe sonis en la oreloj de Marina.

La nova instruisto parolis tiel, kvazaŭ la figuroj de la literaturaj verkoj vivus antaŭ liaj helaj okuloj. Liaj lecionoj estis emociaj rakontoj pri la homoj kaj vivo. Kaj per aliaj okuloj Marina komencis vidi la urbeton, kie ŝi naskiĝis kaj la maron, ĉe kiu ŝi kreskis. Iel malklare Marina komencis kompreni, ke eble la maro ne estas nur rimedo por vivteno, sed io alia, pli esenca, pli profunda. Kaj ŝi komencis pli atente aŭskulti la amarajn maristajn kantojn, kiuj alflugis vespere de la havena drinkejo.

Marina ofte vidis la novan instruiston, kiu sola promenadis sur la bordo aŭ dum horoj staris sur la akraj maraj rokoj. La aŭtuna vento flirtigis lian nigran mantelon kaj li similis al granita monumento sur la blua mara senlimo.

Foje, en literatura revuo, Marina legis poemon, verkitan de ŝia instruisto. La titolo de la poemo estis „La maro", kaj kiam Marina legis la poemon, kvazaŭ sala mara vento milde karesis ŝiajn vangojn. Ŝi eksentis, ke ŝi ruĝiĝis kaj varmaj ondoj skuis ŝian bruston.

Marina multfoje jam aŭdis la flustrojn de siaj samklasaninoj kaj ŝi sciis, ke multaj ŝiaj amikinoj enamiĝis al la juna instruisto, sed ŝi neniam supozis, ke ankaŭ ŝi kaŝas similajn sentojn.

„Tio tute ne eblas — maltrankvile diris Marina —. Mi estas 17 jara kaj li 30 jara. Li estas instruisto, mi — lernantino..."

Sed la pekaj pensoj ne lasis ŝin trankvila. Ŝi senĉese diris en si mem, ke tio estas neseriozaj sentoj kaj multfoje mallaŭte ripetis la strofojn de „La maro", kiujn ŝi nevole ellernis parkere. Sed ŝi ne povis liberigi sin de tiu ĉi nova penso.

„Ne! Mi ne amas lin! — ŝi ripetis en si mem. — Mi amas nur lian talenton. Aŭ eble tio ne estas amo, tio estas nur estimo de lernantino al instruisto. Lia poemo ekplaĉis al mi, kaj mi skribos al li leteron. Mi nur skribos, ke li verkis belan poemon."

Kaj Marina longe pripensis la enhavon de sia letero. En la letero ŝi nur deziris sincere esprimi ĉiujn sentojn, kiujn kaŭzis en ŝi la poemo.

Marina multfoje komencis la leteron kaj multfoje disŝiris la paperon. Tiu ĉi estis la unua letero, kiun ŝi skribis al viro. Ŝia tremanta mano senforte haltis sur la blanka papero kiam ŝi pripensis, ke la sinjoro instruisto hazarde komprenos kiu estis la aŭtoro de la letero.

Eble ankaŭ ŝiaj samklasaninoj iel ekscios pri ŝia letero kaj tiam pro aludoj kaj primokoj por ŝi ne estos plu loko en la provinca filistra urbeto, kie ĉiuj scias ĉion pri la aliaj.

Sed ŝi kredis, ke nur tiu ĉi letero trankviligos ŝin kaj post unu nokto ŝi renkontis la tagiĝon ĉe la blanka papero. Ŝi skribis la leteron, provante ŝanĝi sian skribmanieron kaj sen subskribo ŝi sendis ĝin matene.

Sed post la sendo de la letero ŝi tuj eksentis pli fortan maltrankvilon kaj ŝi ege ektimis, ke nur post unu tago jam la tuta urbo ekscios pri ŝia letero. Ŝi jam sincere bedaŭris pri sia naiva kaj infana ago, sed ŝi estis ankaŭ feliĉa, konfesante sian senton al tiu, kiun ŝi eble amas.

Kelkajn tagojn Marina kaŝe kaj atente enrigardis en la okulojn de siaj amikinoj, sed nenion maltrankviligan ŝi rimarkis tie.

Kiel ĉiam, Gorov trankvile instruis kaj en la silenta klasĉambro lia voĉo eĥis kiel en majesta katedralo.

Sed post tri tagoj li ekstaris antaŭ la benkoj kaj atente trarigardis la tutan klason.

– La temo de nia hodiaŭa leciono estos la letero – mallaŭte diris Gorov kaj nur por momento li fiksis sian helan rigardon al Marina. – Ankaŭ la letero estas iaspeca literatura verko. En la monda literaturo la leteroj de la grandaj verkistoj havas apartan signifon. El la leteroj de Tolstoj, Goethe kaj Schiller ni ekscias multon pri iliaj sentoj, pensoj kaj vivo.

En tiu ĉi momento profunda silento vualis Marinan. Ŝi senmove rigardis la palan vizaĝon de sia instruisto, lian molan, helan rigardon kaj liajn lipojn, kiuj kare flustris ion.

Neniu eksciis pri la letero de Marina al Gorov, kaj Marina ne estis certa ĉu Gorov komprenis, kiu skribis kaj sendis al li tiun ĉi leteron, sed ŝi sentis, ke unu eta sekreto kunligas nun Gorovon kaj ŝin.

Post unu jaro Gorov forlasis la urbeton. Post lia subita forveturo la silento kaj enuo de la provinca urbo kvazaŭ sufokis Marinan. Longe ŝajnis al ŝi, ke Gorov ankoraŭ estas ĉi tie kaj se ŝi irus al la mara bordo, ŝi tuj vidus lian sveltan silueton sur la akraj nigraj rokoj.

Sed tie, kie antaŭe dum horoj ŝatis stari Gorov, nur laroj svingis grandajn flugilojn, kaj iliaj malĝojaj kriegoj plenigis la senhoman bordon.

Marina trafolumis literaturajn ĵurnalojn, ŝi ne trovis en ili versaĵojn de Gorov, sed ŝi kredis, ke li fariĝis eminenta poeto.

La jaroj pasis, la tempo forviŝis la memoron pri li. Marina edziniĝis kaj ŝia familio translokiĝis en la ĉefurbon.

Marina ankoraŭ senpove staris ĉe la pordo kun la telegramo en la mano.

„Ne! Tiu ĉi ne estis sinjoro Gorov – apenaŭ flustris ŝi. – Ne! Ne povas esti..."

Ŝi eksentis neeviteblan deziron ekkuri post la maljuna poŝtisto, atingi lin, kapti la refaldojn de lia poŝtista jako kaj ekkrii: „Diru, diru, ke via nomo ne estas Emil Gorov, ke vi neniam estis instruisto en la urbeto H., ke vi ĉiam estis poŝtisto, ke mi neniam vidis vin. Diru..." – ŝi ekĝemis kaj la silenta ĉambro sufokis ŝian doloran, obtuzan ĝemon.

Varmaj larmoj plenigis la bluajn okulojn de Marina kaj por unua fojo en ŝia vivo ŝi eksentis doloron pri sia malproksima mara urbeto.

Ŝi ne sciis kio okazis en la vivo de Gorov, kiaj travivaĵoj blankigis lian antracitan hararon kaj kial li devis forlasi sian instruistan profesion kaj preni la poŝtistan sakon.

Ofendo kaj doloro sufokis ŝin.

„Ne estas nobla kaj malnobla laboro" – ekflustris Marina kaj ŝajnis al ŝi, ke nun en la kolombkoloraj okuloj de Gorov ŝi rimarkis etajn brilojn, kiujn ni malkovras nur en la trankvilaj prudentaj rigardoj de homoj, kiuj multe travivis kaj bone ekkonis la vivon.

Jevgenij Vinokurov

Mi vizitis denove

Mi vizitis denove tiun urbon,
kie amis mi el plena koro.
En okuloj miaj grandan kulpon
havis ŝi, sed gardis ŝin memoro.

Jen ŝia domo. Rakonto detala
pri la mort' aŭtune okazinta.
Ŝi mensogema estis, ankaŭ kara,
malbonema kaj tamen aminda.

Tasko komplika. Ne solviĝos far mi.
Sortsekretojn mi plu ne esploras.
Nenion mi scias, povas nur larmi,
sen kompreno. Nur ŝin mi pripoloras.

Edzino

Mi povas resti sur voj' de kutimo...
Ŝi ellitiĝas, al mi akvon donas
eĉ noktomeze. La sola virino,
kiu miajn angorojn, dubojn konas.
En mallum' mi la glason lipen metas
kaj dormas plu. Sed kovrilo sin move
defalas planken. Ree ŝin mi petas,
solan. Ŝi venas sen ŝuoj denove.
Mi krias. Sed denove songĝadenon
mi volas kapti en profunda dormo.
Ŝi unusola konas mian memon,
al ŝi sin turnu ĉiu por informo.

El la rusa: Márton *Fejes*

La solvo de la trisekcado

D-ro tekn. Albert Baka

La demonstritaj teoremoj de la antikvaj matematikistoj, fizikistoj kaj astronomoj estas vaste instruataj en la lernejoj. Tiel iĝis ĝenerale konataj la teoremoj de Pitagoro, la formulo de Herono kaj multaj aliaj tiamaj sciencaj konoj. La helena Taleso de Miletos postlasis tri tiajn matematikajn problemojn, kiuj dum la pasintaj 2500 jaroj ne ricevis solvon. Tiuj tri problemoj estas:

– la kvadraturo de la cirklo,

– la duobligo de la kubo-volumeno per desegno (konstruo),

– la trisekcado, helpe de rektilo kaj cirklilo, t.e. trionigo de angulo, formata de rektoj venantaj el sama punkto.

Multe okupiĝante pri tiuj problemoj, mi devis konstati:

– la kvadratigo de la cirklo estus solvebla nur se π estus determinebla kiel kvociento de du nombroj;

– la duobligo de la kubo-volumeno estus solvebla nur post kiam la geometrio kapablas per grafika konstruado trovi la kuban radikon (kubradiki)

– la trisekcado estas tamen ne ligebla al kondiĉoj, ĉar la kondiĉojn prezentas mem la okazaj geometriaj cirkonstancoj: oni devas do tie trovi la respondon de ĉi tasko.

La problemon de la trisekcado mi sukcesis solvi.

En la ĉi-suba teksto mi konigas skize la solvon, el mia scienca traktaĵo koncizigite. Estu menciataj la konstatoj de la komisiita konsultanto de la Hungara Akademio de Sciencoj: „tiu ĉi metodo rezultigas jam per unu paŝo la solvon, je akceptebla precizeco", kaj „la solvon eblas plenumi eĉ ĝis la – per konstruado entute atingebla – dezirata precizeco".

La metodo estas utila ankaŭ en la praktiko, i.a. ĉe fabrikado de dentradoj, de rotacie moviĝantaj aŭtomatoj ktp.

La figuro 1/ montras, kiel eblas angulon triobligi per rektilo kaj cirklilo. Desegnante unue (nur) la X-akson de la koordinatoj, signu la punkton A. El A, kiel vertico, desegnu akutan angulon α, kies suban rekton formu mem la X-akso. Sur la supra rekto notu ajnan punkton K. Estu la longo AK

FIGURO 1.



FIGURO 2.



FIGURO 3.



la radiuso de cirklo, kaj K ties centro. Prenu en cirklilon la longon AK=R, kaj el K la cirklilo streku sur la X-akso la punkton O. Ĉi tiu estos la centro de nia koordinato-sistemo, do tra ĝi per ortanto konstruu la akson Y. Post tio la koordinato-sistemo pretas por la solvado.

La sekva paŝo: el O kiel centro de nova cirklo, la cirklilo kun radiuso R = AK = OK sekcu la supran rekton de l' akuta angulo, por akiri la punkton P. La akuta angulo inter la rekto OP kaj la pozitiva akso-X (do inter la rektoj AO kaj AP) estos 3 α.

El P desegnu ortanton al la X-akso; la krucpunkto estos T. Tiel ni ricevis du triangulojn: APT kaj OPT.

Nia originala celo estas trionigi per desegnado la angulon 3 α (fig. 2). Tiucele ni devas inverse plenumi la procedon faritan laŭ la fig. 1).

La solvon donos la trovo de la punkto K, kaj la konstruo de streko tra ĝi kaj P. Certe K situas sur la cirklo desegnita ĉirkaŭ O kun radiuso OP=R, sed ni ankoraŭ ne konas ĝian precizan lokon. Tamen laŭ fig. 1 ni scias, ke la angulo α (ĉe A) jam duobliĝas ĉe K je 2 α, kaj ĉe O triobliĝos je 3 α. La loko de K estas do konstruenda surbaze de tiuj konsideroj.

Desegnu do el P du strekojn en direkto de la supozata loko de A; ili tranĉas sur la cirklo (kies centro estas O) la punktojn K_1 kaj K_2 (fig. 2). La figuro 3/ montras la kontroladon de la konstruado. Estas videble, ke oni devas kontentigi ankaŭ la kondiĉon AK = KB.

Sur fig. 2/ la cirklilo el K_1 kaj K_2 ne tranĉas sur la Y-akso la punkton B. Tial ni kaptos per cirklilo kun radiuso R: sur la rekto K_1P la punkton B_1, kaj simile sur la rekto K_2P la punkton B_2. Sed ĉi tiuj punktoj ne kuŝas sur la Y-akso, nur apud ĝi. Tamen se ni interligas la punktojn B_1 kaj B_2 per streko, ĝi sekcante la Y-akson prezentas la serĉatan lokon B.

La taŭgecon de la tiel trovita B pruvas, se la distancoj AK kaj KB estas egalaj, ankaŭ kun radiuso R. Plilongigo de la rekto PB donas la konvenan direkton, per kiu ĝi sekcas sur la X-akso la punkton A.

Laŭ fig. 3/ ni ricevis du triangulojn: APT kaj OPT. Evidente la longo PT estas la sama latero de ambaŭ trianguloj. La lateroj sur la X-akso estas la longoj AT kaj OT, kiuj estas noteblaj per la sekvaj formuloj:

$$OT = R.\ \cos 3\alpha \text{ kaj}$$

$$AT = 2R.\ \cos \alpha + R.\ \cos 3\alpha.$$

Laŭ tiuj matematikaj rilatoj estas do konstateble, ke la tasko estas solvebla ne nur per desegno, sed ankaŭ per raciaj nombroj, laŭ matematikaj reguloj.

Mia menciita disertaĵo kompreneble havas multe pli da detaloj, kaj por interesiĝantoj mi volonte donos pliajn informojn.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Pri Miklós Izsó

unu el la pioniroj de la hungara skulptarto

Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Miklós Izsó, eble la plej interesa figuro de la hungara skulptarto en la 19-a jarcento. Lian naskiĝlokon, situantan en la nordorienta parto de Hungario, okaze de la 75-a datreveno de lia morto, oni nomis *Izsófalva* (Vilaĝo de Izsó). Dum sia junaĝo li ne montris interesiĝon pri la artoj. Estinte 17-jara li partoprenis la liberbatalon de 1848/49, kaj kiel leŭtenanto li montris sin eksterordinare kuraĝa.

Post la falo de la liberbatalo li devis kaŝi sin. Tiam li komencis okupiĝi pri skulptado de tombŝtonoj kaj aliaj ornamaĵoj. István *Ferenczy*, tiama elstara skulptartisto malkovris en Miklós *Izsó* la talenton, kaj instigis lin al la skulptista kariero. Tri jarojn Izsó lernis apud la meritplena majstro, kaj poste li iris en la ĉefurbon, por trovi sian ŝancon. La laboreblo en la ĉefurbo ne kontentigis lin, tial li pluiris en Vienon. Li kontaktiĝis kun hungaraj universitataj studentoj, kiuj finance helpis lin, kaj li daŭrigis siajn studojn en la Arta Akademio de Munkeno. Por danki pro la konsiderinda helpo al siaj junaj amikoj, li skulptis kaj sendis donace al la Hungara Akademio de Sciencoj la buston de István Széchenyi (fondinto de la Akademio).

Dum li kopiis en Munkeno la majstroverkojn de la antikva skulptarto, obsedis lin la hejmsopiro. Ĉiam pli li pensis pri sia patrio, en lia fantazio aperis la hejmaj travivaĵoj, la karakteraj figuroj de la hungara vilaĝo, la paŝtistoj, dancantaj fraŭloj. Li sentis, ke li devas kulturi la veran hungaran skulptarton. Dum siaj someraj ferioj li vizitis la ŝatatajn hejmajn pejzaĝojn, inter ili ankaŭ la stepon de Bugac (situantan sur la okcidenta parto de la Granda Ebenaĵo, inter la Danubo kaj Tisa.) De tie li ĉerpis la temon por sia famiĝinta skulptaĵo: *La malĝoja ŝafisto.* La famo de tiu ĉi skulptaĵfiguro rapide disvastiĝis ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande, ja aŭtune – reirante al Munkeno – li kunportis la skulptmodelon, por plumaturigi ĝin, kaj plenumi la mendon de hungara fabrikisto, kiu petis de li skulptaĵon el marmoro.

„La malĝoja ŝafisto" akiris grandegan sukceson por Izsó. Ĝi ravis ne nur la publikon de la ekspozicio, sed ankaŭ la artistajn membrojn de la ĵurio. Ili deklariĝis pri ĝi jene: „Tiu ĉi figuro vivas. Per la okuloj ĝi esprimas la tuton de la nacia karaktero. Tiu vizaĝo orienteca en si mem estas elstara modelo de la vira beleco." Nuntempe la skulptaĵo estas videbla en la Muzeo Déry en Debrecen.

Krom la menciita majstroverko, Izsó kreis multajn portretojn pri historiaj kaj literaturaj elstaruloj de Hungario, kaj prilaboris diversajn figurojn de la kampula vivo hungara.

La vivo de Izsó estis mallonga. Li mortis en la plej matura epoko de sia vivo, 44-jara, la 29-an Majo 1875, pro tuberkolozo.

István *László*

ORIGINALA POEZIO

Edwin de Kock

Arta transmuto

La tag' forbrulis,
nigriĝe al karbono.
Polvo malpura?
Aŭ diamant' pli dura,
brila, ol ŝtal' aŭ ŝtono.

El la lerneja mondo

1

La lernejanoj
hodiaŭ min krucumis,
dekmilan fojon.
Pro mia am' rikanis;
skurĝis, murdis la ĝojon.

2

Novembre ĉi kvin
abiturientinoj
dum ekzameno.
Dolĉas ekstere turta
tumulto. Somerveno.

3

Infana gento.
Post jaro en mi kanjon'.
Jam forfluas nun
lernejaj stulto kaj jun'.
Valora sedimento?

John J. Francis

Plankatene

Donu penikon
kaj sovaĝajn farbojn
vastan kanvason
kaj obean manon.
Tiam mi ĉesos entrepreni la neeblon
per vortoj.

Vortoj! Kia absurdo
fiksi volutojn el etero
per signoj de sonoj;
haki l' aspiran kurbon de sublimo
frakase formale
en arbitron abocan;
poste kunskrapi la ruberojn
perverse reformi.

Belo kaj vero
ŝvebas ĉirkaŭe, kaj konscio ŝvelas
al tuŝo; asimila koincido,
kiu likvidus barojn, kaj la solvon
distilus en konkreton.
Sed vortoj trudas ŝanĝojn
kaj interpret' por sama la similan,
ĉar mankas ebloj pensi kun nuancoj,
kaj la subtilojn krokos nur konkreto
kie likvido fintos la destinon
kaj interpreton spitos interŝanĝo:

bero kaj velo.

István Takács

Ŝerca fabelo pri belo

Habelo en fabelo
Miris pri bela abelo.
Li pensis pri bela Bella,
Kaj li iĝis pri fabela belo ribela...
Finiĝis la bela fabelo pri ribela Habelo.

Adalberto Hules

Kiel la ekskursanto

Kiel la ekskursanto,
kiu sian nomon gravuras en arbon,
aŭ skribas sur ŝtonon
(en tiun lokon neniam li revenos,
kaj la fremdulo,
kiu legos
la skribon,
sentas nenion),
ankaŭ mi markas nun tiun ĉi tagon:
ankoraŭ mi vivas!
Amikoj, mi vivis, efektive,
mi amis, mi timis...
Tiu ĉi minuto per nenio distingiĝas:
pleje ĝi taŭgas,
ke mi pensu pri la morto.
Amikoj, mi vivis, efektive,
kaj mortos ankaŭ vi...
El distanco de jarmiloj mi rerigardas;
tiel mi konservas por eterne
tiun ĉi momenton.
Ne ekzistas grava objekto
kaj ne ekzistas malgrava.
Ununura objekto ekzistas: la vivo.
Pri tiu ĉi mi parolas
je obstino mania –
alian direndon
mi ne havas.
Amikoj, mi vivis, efektive
neniam tion vi komprenos.
Jen la granda enigmo,
la fajro cindriĝinta:
pluiris la varmiĝintoj...

Norde falis stelo...

Forpasis Hilda Dresen

Komence de februaro funebra informo trakuris la esperantistan mondon. El la Estona SSR, en la ĉefurbo Tallinn poreterne forlasis nin la mildvoĉa poetino de Nordo: Hilda Dresen, unu el la lastaj reprezentantoj de la granda generacio de Literatura Mondo. Unu el tiuj, kiuj ekde la komenco de la 20-aj jaroj grupiĝis ĉirkaŭ Baghy kaj Kalocsay.

La informo estas apenaŭ kredebla. Ni ja sciis, ke de jaroj ŝi estis sub kuracista kontrolo; malgraŭ sia malsano ŝi estis spirite freŝa, interesis ŝin ĉiuj literaturaj kaj movadaj okazintaĵoj, eĉ la plej malgrandaj.

En decembro ŝi ankoraŭ skribis pri pli novaj planoj: pri plipolurado kaj pri plua prilaboro de siaj Under-tradukoj. Ĝoje ŝi skribis, ke ŝi tralaboris sian longan originalan poemon „Karto de Sendankulo", verkitan antaŭ la milito. La estona kritiko laŭdis la verkon, sed ŝi ne sciis kiel ĝi plaĉos al la esperantistaro. Ŝi atendis la tiurilatan kritikon de W. Auld, kiu „decidos pri ĝia sorto."

La pasintjara forpaso de la fama estona poetino, Marie Under animskue influis nian mildaniman Hilda Dresen. De tiu tempo ĉiam pli ofte ŝi meditadis pri la morto. La malgaja, iom pesimisma liriko de Marie Under staris tre proksime al ŝia naturo, kaj al tio certe aldoniĝis ankaŭ admiro pri la populara, talenta poetino de la intermilita kultura vivo en Tallinn.

Hilda Dresen dum sia preskaŭ 60-jara fideleco al nia literaturo riĉigis ĝin per valoregaj verkoj. Ŝi konatiĝis kun Esperanto en 1913 kaj post dek jaroj ŝia nomo aperis sur la frontpaĝo de Literatura Mondo; ŝi estis ĝia kunlaboranto. De tiu tempo unu post la alia aperas ŝiaj Under-tradukoj, kiujn la Esperanto-Asocio de Tallinn en 1929 eldonis en aparta volumo, sub titolo „Elektitaj versaĵoj de Marie Under". Ĝin sekvis post du jaroj aliaj du tradukvolumoj: „Horizontoj" de J. Barbarus kaj „Estonaj Kantoj" kaj sekvontjare, en 1932 aperis la „Estona Antologio".

En 1934 LM eldonis sian literaturhistorie faman antologion „Dekdu Poetoj", en kiu Hilda Dresen montriĝas kiel maturiĝinta poetino. La intermilitan periodon ŝi fermas per „Svisa Antologio", kies germanan parton ŝi tradukis.

Dum la teruraj jaroj de la dua mondmilito ankaŭ ŝia Muzo silentis kaj la perdo de la amata fratino Helmi postlasis en ŝi signojn neforviŝeblajn.

Pri Hilda Dresen denove ni aŭdas nur en 1955, kvankam sur tereno tute fremda al ŝiaj kapabloj. Dum kelkaj jaroj ŝi transprenis la rolon de sia murdita fratino, kaj entuziasme helpis revivigi la E-movadon en Estonio.

„Norda Naturo", ŝia originala poemvolumo aperis en 1967, okaze de ŝia 70-a naskiĝtago, kaj tiu volumo jam montras iom alian Hilda Dresen. En la poemaro ŝin ligis nenies pensoj kaj formoj kaj ĉi tie ŝiaj pensoj, liberiĝantaj de ĉiuj influoj, flugas tute libere. La tono de la poemoj estas iom melankoliaj, sed kiel Kalocsay rimarkis, tiu melankolio „ne estas plorema sentimentaleco: ĝi similas al la morna koloro de la ĉielo, tra kiu oni esperas kaj volas lumon."

Post kvar jaroj, en 1971, la reviviĝanta soveta libroeldonado aperigis la verkon „Liriko de Lesja Ukrainka" kaj inter la tradukantoj ni trovas la nomon de Hilda Dresen. Tiutempe aktiviĝis la jam grava E-ledonejo Eesti Raamat, kie en 1975 aperis fragmentoj el „Kalevipoeg"; en 1977 laŭ ŝia elekto kaj traduko „Estona Soveta Poezio"; en 1978 la poemaro de Vladimir Beekman „Lumo de Orienta Eŭropo", kiun ŝi tradukis kun Jaan Ojalo kaj Hillar Saha.

Ŝia lasta traduko „Al abelujo ĝi flugas" de Juhan Liiv, aperis en 1980. Al la libro ligiĝas historieto, kiu pli ol io ajn karakterizas ŝian profundan modestecon. Post la apero de la Liiv-volumo W. Auld skribis al ŝi, ke la lirikeco de Liiv ravis lin. H. Dresen respondis: ŝi scias, ke W. Auld estas entuziasmulo, tamen surprizis ŝin „ke tia simpla poezio ekplaĉis al li, kiu ŝatas pli modernan, filozofian poezion..." W. Auld, por komprenigi, ke liaj vortoj estis sinceraj, sendis al H. Dresen la kopion de la recenzo, kiun li verkis por la revuo „Fonto", aperanta en Brazilo. „Tion mi ja kredas – ŝi rimarkis en unu el siaj leteroj –, tamen tro emfaze..."

Tia ŝi estis.

La pritrakto de ŝia vivoverko estos la tasko de literaturistoj, tamen tion ni povas aserti: la traduklaboro de H. Dresen grave kontribuis al la konigo kaj disvastigo de la literaturaj valoraĵoj de malgranda nacio, pruvante la tiurilatan gravecon de nia lingvo.

Finiĝis vivo abunda en sukcesoj kaj ni povas adiaŭi de ŝi per la vortoj de ŝia amikino Ludmila Jevsejeva, kiujn ŝi skribis post la forpaso de nia Julio Baghy:

...ne ploru popolo, poeto ne mortas...

Árpád *Abonyi-Nagy*

K. Kalocsay

Rimportreto

Hilda Dresen – *padus' odoras*
super degela marĉa ŝlim'
betuloj en la malproksim'
blanktrunke vintron rememoras.

Sub frosta norda krusto floras
kaŝitaj sentoj en anim',
Hilda Dresen – *padus' odoras*
super degela marĉa ŝlim'.

Nun aŭdu, sur la lir' sonoras
sudlande arda koresprim',
kaprica ritmo, sorĉa rim':
Marie Under ardfosforas...

Hilda Dresen – *padus' odoras.*

Hilda Dresen

Paduso

Paduso, reĝino de l' Nordo
kun blanka floraro,
unua printempa heroldo,
ornam' de l' kamparo.

En ĉiu ĝardeno vi floras,
en ĉiu korteto,
agrable kaj sorĉe odoras
en nokta kvieto.

Kaj kvazaŭ neĝeroj, hezite,
petal' post petalo,
ŝutiĝas florar' via glite
dum sia disfalo.

La blankaj petaloj enŝtelas
sin ĝis la homkoro,
kaj daŭre aromas kaj helas
en nia memoro.

PANORAMO

La ekspozicion vizitis preskaŭ naŭdek mil personoj – ili estas vojaĝemuloj, do potencialaj esperantistoj. Ĉu ni sukcesis veki ilian atenton pri la Internacia Lingvo?

Vojaĝo – kaj Esperanto

Jam la kvaran fojon estis aranĝita en Budapeŝto la ekspozicio „Vojaĝo" inter la 19a kaj 29a de marto. El la sesdek eksponantoj dek kvar estis eksterlandaj. Preskaŭ naŭdek mil interesiĝantoj vizitis la ekspozicion en la salonoj de la impona Etnografia Muzeo, vidalvide al la Parlamentejo. Fremdultrafikaj oficejoj, vojaĝagentejoj, hotelentreprenoj prezentis sin per allogaj afiŝoj, projekciadoj, gigantaj fotoj, spritaj prospektoj, parte al la vasta publiko, parte al la partner-entreprenoj. Tiu ekspozicio nome estis ne nur informdona en vojaĝ-aferoj, sed ĝi havis ankaŭ la karakteron de borso, kie vojaĝagentejoj ĉeloke vendis-aĉetis, interŝanĝis vojaĝojn, programojn. En la ĉijara Budapeŝta ekspozicio jam pluraj tiaj kontraktoj estis subskribitaj. Ĉiuj partoprenintaj eksterlandaj vojaĝagentejoj estis kontentaj kaj kune kun ili ankaŭ pluraj novaj turismaj organizoj anoncis sin jam por la sekvontjara „Vojaĝo '82."

Nun la unuan fojon ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio ricevis oportunan informejon en ĉi tiu grava ekspozicio. Krom la eksponaĵoj, surskriboj kaj buŝa informado estis senpage disdonitaj ankaŭ esperantlingvaj turismaj prospektoj, varbiloj por Esperanto-kursejoj en Pollando kaj Bulgario, aliĝiloj al koresponda kurso kaj kelkdek mil ekzempleroj de tridek du paĝaj kajeretoj, eldonitaj de la Landa Turisma Oficejo. La kajero estas *Baza Esperanto-Konversacio por Turistoj*, kiu enhavas sur kelkaj paĝoj la koncizan gramatikon, kolektaĵojn de la plej uzataj ĉiutagaj vortoj, krome pretajn frazojn, parolturnojn, esprimojn necesajn por turistoj en diversaj situacioj. Ĝi estas rezulto de internacia iniciato, en kiu partoprenos fremdultrafikaj partnerorganizoj, eldonante similajn kajerojn por turistoj kaj por laboruloj priservantaj ilin.

La informejo de HEA en la ekspozicio. De dekstre staras: d-ro V. Sághy, ministro pri interna komerco; d-ro I. Pethes kaj d-ro O. Haszpra, vicprezidantoj de HEA; d-ro F. Szabó-Felső, ĝen. sekretario de UEA; I. Szabó, organiza sekretario de HEA; G. Maertens, prezidanto de UEA; T. Vaskó, sekretario de HEA; d-ro V. Sadler, ĝen. sekretario de UEA

La 28-an de marto vizitis Hungarion s-roj G. *Maertens*, prezidanto de UEA kaj d-ro V. *Sadler*, ĝenerala direktoro de la Centra Oficejo de UEA, por transdoni la Trofeon *Fyne* al HEA pro la elstara agado de la hungara asocio inter aliaj en la aplikado de Esperanto sur la tereno de sciencoj. Alia celo de ilia vizito estis fari kontrakton kun HEA por krei en Budapeŝto oficejon de UEA por eldona, scienca kaj faka agadoj. La sciencan eldonan agadon kunordigos d-ro Ottó *Haszpra*, universitata profesoro.

La estraranoj de UEA havis la eblecon renkonti s-ron József *Timmer*, sekretarion de Tutlanda Konsilantaro de Hungaraj Sindikatoj, kun kiu ili interparolis pri la komuninteresaj demandoj de sindikata kaj esperantista movadoj.

Vizitante la ekspozicion „Vojaĝo '81" la estraranoj de UEA renkontis s-ron Vilmos *Sághy*, ministron pri Enlanda Komerco, kiu samtempe estas prezidanto de la Landa Turisma Konsilantaro. Ili dankis s-ron Sághy pro la favora elpaŝo por Esperanto en la Mondkonferenco de Turismo en Manila aŭtune de 1980, kiun en bone akceptita propono prezentis s-ro Márton *Lengyel*, vicestro de la Hungarlanda Turisma Oficejo. (Vidu en HV 1981/1, paĝo 4.)

PANORAMO

Damcervoj

La nova hejmo de 448 laboristoj

Hejmo por fervojistoj

En Budapeŝto oni inaŭguris la plej modernan laboristan hejmon de la Hungaraj Fervojoj. En ĝi povos loĝi 448 laboristoj, laborantaj en la ĉefurbo, sed havantaj sian familion en provinco. La luksaj loĝcirkonstancoj certe plifaciligos la vivon de tiuj laboristoj, de kiuj dependas la funkciado de la plej grava transporta entrepreno de Hungario.

Hungara–itala kunlaboro

Bone funkciis la kunlaborado inter la hungara entrepreno pri ekstera komerco Mineralimpex, la Trusto de Hungarlanda Ŝtonoleo- kaj Gasindustrio kaj la itala firmao AGIP Petroli. Tial la estraranoj de la tri organizoj subskribis interkonsenton per kiu ili plilongigis la validecon de la kunlabora kontrakto por pluaj dek jaroj.

Ĉasistoj, atentu!

Kreskis la nombro de la bestoj en la arbaroj de departemento Borsod (norda Hungario). Oni nombris en la departemento sur tereno de ĉirkaŭ 60 mil hektaroj pli ol 11 mil cervojn, kapreolojn, muflojn, aprojn. En la regiono apud la rivero Tisa estis observitaj ankaŭ kelkaj damcervoj.

300-jara skizkajero

Arthistoria raraĵo estis trovita en iu vilaĝa paroĥo de la sudhungarlanda departemento Baranya. La objekto estas 300 jarojn aĝa skizkajero, kiu enhavas 250 originalajn desegnaĵojn de aŭstraj majstroj. Pro la eksterordinara valoro oni deponis la binditan kolektaĵon en la episkopa biblioteko de Pécs.

Tendaro por artistoj

Skulptistoj, ceramikistoj, pentristoj, grafikistoj kunvenas el Hungario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Pollando, Rumanio, Sovetio ktp. en la t.n. artistaj tendaroj, kiujn funkciigas dum la printempa kaj somera sezonoj pluraj provincaj urboj de Hungario.

Tiuj tendaroj alportas reciprokajn avantaĝojn kaj por la gastoj-artistoj, kaj por la funkciigantaj urboj. La artistoj trovas en la tendaroj bone ekipitajn artlaborejojn, kie ili povas eksperimenti kaj krei inter la plej favoraj cirkonstancoj. Ankaŭ la gastigantaj urboj gajnas: la tie kreitaj artverkoj ordinare riĉigas la placojn, galeriojn ktp. de la koncernaj urboj.

Tre fama jam estas la tendaro por lignoskulptistoj en Nagyatád, kie la artistoj laboras en aparte bela natura medio.

En la artista tendaro por lignoskulptistoj (Nagyatád): Ramón Haiti Eduardo, artisto el Kubo, kaj Juris Sinkievič, soveta artisto dum laboro





malmultekosta,
bongusta novaĵo

HOT-DOG

KOLBASO

48 Ft/kg

HÚSIPAR

REVUO DE REVUOJ

Kial ne „Revido" de revuoj? – demandis amiko ŝerce, kaj li tuj klarigis: li kvazaŭ *revidas* liajn abonitajn revuojn, kaj tiujn legitajn en publika biblioteko (kiu post pluraj samideanaj instigoj inklineme abonis kelkajn) en tiu ĉi rubriko. Mi devus ĝui tian fonon de lia humoro, sed subite mi pensis pri *ne gaja paĝo* de la afero; nome mian memoron agrese atakis svarme la multaj, kiuj – kontraŭe al mia legema amiko – ne emas pluajn aboni, nur la unusolan. Jes, tiun bultenon, lokan ligilon, eble-eble internacian revuon. Ĝuste nun, kiam la paletro de nia gazetaro forte vigliĝis enhave, kaj vastiĝis je bunta florkrono, kiun ni eĉ fiere rajtas montri al la mondo (t.e. precipe en ekspozicio): *kiu* internacia kultura movado kapablas produkti tian gamon da interesaj periodaĵoj?

Kutime aferoj maturiĝas samtempe en pluraj lokoj. Malneto de tiu ĉi artikolo estis jam preta, kiam la poŝto alportis el Italio revuon, en kiu mi je surprizo povis legi similan „krion". En L'ESPERANTO eĉ la konsekvencojn deduktis Aldo *de Giorgi:* ĉar evidentas, ke nia revuaro estas *ofte* pli riĉenhava ol libroj, kiuj ricevas recenzon gazetan, oni devas des pli fari recenzon (revidon? revuadon?) pri E-revuoj! Nia recenzema rubriko – sendispute la plej malnova nun en Esperantio – ne nur salutas tiun akordiĝon, sporade jam aperantan ankaŭ en aliaj E-gazetoj, sed antaŭvidas utilajn disputojn tiurilate inter la revuadoj pri taksado kaj aprezado, celante perfektigon de la plej gravaj, *internacie* legindaj revuoj. Neniu povas nei aŭ pridubi la ekziston de lokaj aŭ asociaj bultenoj, la disputoj pri ilia ekzistorajto jam apartenas al la pasinto. Tamen la mision, prezenti profesie altnivelan, kulturan kaj movadan ĝeneralan vidon, igi la animojn vere internaciecon konsiderantaj – plenumas, kiel ĝis nun faris, la (eble) deko da imponaj revuoj. Neniel uniformitaj, inter si malsimilaj, ili estas la ĉefaj portantoj de la internacilingva kulturo, la presitaj manifestantoj de nia vasta (jes, pli vasta ol oni kutime kredas) movado. Diversaj koloroj sur la paletro. Eblas elekti el ili, selekti por si la plej plaĉajn – pli ĉi erojn vi subtenos tiel!

Vere respektinda alparolo pri nia horizonto aperis en HEROLDO, de Giordano *Azzi*: ĝian studon al propagandistoj kaj estraranoj mi forte rekomendas. Kial? Ĉar li koncize kaj logike kunmetis la realajn eblecojn kaj perspektivojn de IL, montrante ankaŭ kiel suprajaj, neglektemaj kaj false arbitraj konkludoj „sukcesis" aperi en certaj analizoj lastatempe. Kvankam tiuj (jam diskutitaj) analizoj ne venis de niaj kontraŭantoj, sed de objektivemaj e-istoj aktivaj, tamen – eĉ ĝuste tial! – havas nepran gravecon deŝmiri la erarojn kaj ŝuti helan lumon sur situacion kaj vojon de nia afero. Atentinde ŝajnas al mi la instigo de Azzi, vaste malfermi niajn kongresojn antaŭ la ne-esperantista mondo. Estas jam tempo, vere, ke UK kaj kelkaj aliaj, fakaj, kongresoj, konferencoj fariĝu ne „kongresoj de esperantistoj", sed „kongresoj diskutantaj (ĉefe) Esperantlingve", kie – komence – nacilingvaj alparoloj de eksteruloj estos interpretataj en Eo por la publiko, kiu replikos E-e...

Eblas longe foliumadi en MONATO mi preskaŭ dirus: monatelonge ĉar ĝia artikol-diverseco igas legi iutage ekzemple la historiajn skribaĵojn ekz. de B. *Golden*, kaj alitage ekonomiajn temojn aŭ novelon, jen laste de Johán *Valano.* Kaj mi ankoraŭ ne elĉerpis ĉion. La entrepreno, tiom kuraĝa ĝi ŝajnis ke hodiaŭ oni jam – homa inversemo! – tute ne miras la bravan venkon trankvile akceptante. Mi atentigas vin ankoraŭ je la „satiro" de Giorgio *Silfer* (jes, en Monato), kiu estas multe pli serioza ol legi ĝin satira..: La grava rolo de judoj en la Eŭropa kulturo konfliktas kun psika rezistemo, sufiĉe natura, de multaj Eŭropanoj – tiu probabla tezo elvolviĝas en komparo de du alie orientitaj kuzoj. Prudenta spegulo!

LUMO venas (ankaŭ) el Kanado, ja por Novzelando, Japanio k.a. „lumo venas de oriento", do laŭproverbe. Sed flankenigante sin lanĉantan vortŝercon, estas sciate, ke artikoloj de tiu Kanada revuo estas ĉiam rimarkindaj. Krom interesaj aktivaĵoj, pri Pacifika E-Kongreso, elstaras la analiza artikolo de Vilma *Eichholz* pri seksa diskriminacio en Eo. Vere, tiurilate (vd. kurac isto, studento, -ino) Eo necese sekvis la kutimojn de la etnaj lingvoj, kiuj identis kun la (tiama) socia pensmaniero, evoluinta dum jarcentoj. Kvankam eblas subkompreni pri „prezidanto" viron oni rajtas kompreni (aŭ elekti) same virinon! Ĉu tiucele oni diru ekz. geinstruisto aŭ goinstruisto nur por signi *eblecon* de du genroj? Ĉu ne pli simple estas, asertas la aŭtoro (tiurilate ne interesas min ties genro), almeti -inon *nur* se tio estas substrekinda? Kial ĉiuminute substreki la inecon ekzemple de la brita ĉefministro? Aliflanke ĉu oni foje signu la virecon per nova sufikso? Sendube, ia vera egaleco per tio apenaŭ estus atingebla, atentu, ke kontraŭ la „socia kutimo kaj pensmaniero" nuntempa ni ne agu.

Sendiskriminacia traktado devas efektiviĝi en la vivo de la socio – ne tro rapida procezo kompreneble –, lingvo nur sekvos tion. distingi ne estas nepra devo, kaj la distingo mem diskriminacias. En la hungara (socio, sekve lingvo) ekzistas akra distingo inter ne kaj jam edziniĝintaj virinoj. Alia popolo ekzemple distingas ne tiel, sed laŭ matureco! Renversi (rapide) nenie eblas. Solvon pri la bone prezentitaj problemoj kaj solveblecoj de tiu analizo plenumos iam la socia evoluo (mi bedaŭras ke ne la lingvistoj).

Ervin *Fenyvesi*

Metiejo

Ĉi-numere forestas la kutima epiteto „literatura" el titolo de tiu ĉi rubriko, kaj ne hazarde, ĉar la pritraktata temo fakte ne apartenas al beletro. Temas pri ĝenro, kiun tamen ne povas malhavi kultura revuo, kiu logas, amuzas, eĉ instruas amasojn – pri krucenigmo, kiun ankaŭ ni regule publikigis dum la lastaj dek jaroj.

Enigmoj kaj rebusoj – apud ceteraj gazetaj akcesoraĵoj, ŝercoj, bildrakontoj, ŝak-rubriko ktp. aperadis en la gazetaro jam dekomence; tiu speco de enigmoj estas relative juna: ĝi komencis sian karieron antaŭ sesdek jaroj. Kiel ĉiu novaĵo, ankaŭ ĝi havis kaj havas fervorajn adeptojn, same ardajn kontraŭulojn. Nia revuo – konsiderante la interesiĝon de sia legantaro – ne povas resti indiferenta: ni intencas daŭre publikigi enigmojn.

Nun, okaze de la sesdeka, jubilea jaro ni volas atingi duoblan celon pere de tiu ĉi publikaĵo: krom disvastigo kaj popularigo de enigmoj – kies solvado kaj kompilado povas pliperfektigi ankaŭ la lingvoscion – ni volas varbi ankaŭ kunlaborantojn. Tiucele ni malfermas konkurson kun la jenaj kondiĉoj:

Ĉiu konkursanto rajtas alsendi po du enigmojn. La manuskriptoj estu tajpitaj kun duobla interspaco, en unu linio po 60 literspacoj. Pli larĝa marĝeno estu maldekstre. Pri la retoj ni petas po du desegnaĵojn: unu plenigitan kun solvo por kontrolo, unu malplenan reton por la desegnisto. Ankaŭ la difinojn alsendu kun kopiaĵo. Limdato: du monatoj post apero de tiu ĉi numero. La konkursaĵojn taksos ĵurio konsistanta el redaktoraranoj de HV, inter ili ankaŭ ekskunlaboranto de „faka" nacilingva enigma revuo „Füles".

Apartan premion ni ne promesas, nur aperigon de la bonaj enigmoj kaj kutiman honorarion por la publikigitaj konkursaĵoj.

Anstataŭ prezento de evoluo kaj de diversaj tipoj de krucenigmo ni detale priskribas la regularon de tradiciaj enigmoj. La subaj, severaj postuloj ne signifas, ke ni volas publikigi nur tiajn enigmojn. Ni kompilis tiun severan regularon, ĉar ĝia apliko estas bone mezurebla; kaj se iu kapablas plenumi ĝin, tiu certe povos jam lerte manipuli ankaŭ per alispecaj enigmoj. Severaj estas la reguloj, sed ne neplenumeblaj. Tion pruvas la enigmoj, aperintaj en la nuna kaj la antaŭaj numeroj de HV.

Reguloj pri formo

1. Krucenigmoj de HV estas simetriaj kvadratformaj aŭ oblongaj retoj, konstruitaj laŭ la subaj reguloj, en amplekso de 225–400 kvadratoj.
   – minimume: 15x15, maksimume: 19x21; prefere: 17x17 aŭ 17x19
   – akso de simetrio estu ĉu horizontala, ĉu vertikala, ĉu diagonala.
2. Amplekso de la alsendendaj linioj estu minimume tiom, kiom estas perimetrio de la reto.
   – la ĉefliniojn eblas kurbigi de horizontalo malsupren, de vertikalo dekstren; kurbigita linio ne havu pli ol du kurbiĝojn.
3. Apartigo de linioj en la reto povas okazi per nigraj kvadratoj aŭ per dikigitaj retlinioj.
   – nigraj kvadratoj ne okupu pli ol 1/6-on de la reto, pli bone, se ilia nombro estas malpli ol 15%-oj
   – en reto, konstruita per nigraj kvadratoj dikigita linio povas stari nur ĉe ekstremoj de ĉeflinioj
   – en tia okazo nigra kvadrato kaj dikigita retlinio ne kunkroĉiĝu
   – kvanto de dikigitaj retlinioj en tiaspeca enigmo povas esti 1/3, respektive 30%-oj
   – nigraj kvadratoj povas kunkroĉiĝi unu kun la alia nur ĉe pinto, kaj la ĉenon (ĉu rektan, ĉu kurbigitan) konsistigu maksimume sep nigraj kvadratoj
   – simile, en enigmo kompilita per dikigitaj retlinioj, tiuj sin sekvu nur perpendikle
   – en tiaspeca enigmo oni povas uzi ankaŭ krucon.
4. En la reto ne estu partoj fermitaj, el ĉiu parto estu transiro al alia
   – escepton faras nur la anguloj, sed angulon fermi per diagonale situanta ĉeno en nigraj kvadratoj aŭ per dikigitaj retlinioj oni rajtas nur tiam, se la unua, sub (apud) la ĉeflinio situanta linio konsistas minimume el kvar literoj
   – la tiel fermitaj literoj ĉiuokaze estu publikigitaj.

Reguloj pri enhavo

1. Ĉeflinioj (solvendaj linioj) laŭeble apartenu al iu komuna temo, aŭ enhavu pli longan citaĵon en kurbigitaj linioj.
2. En la ceteraj linioj povas stari:
   – iu ajn Esperanta vorto, radiko aŭ morfemo
   – propraj nomoj (familiaj, geografiaj ktp.) ne tro esoteraj
   – se ties ortografio ne estas Esperanta, oni menciu la nacian ortografion
   – fremdaj vortoj (tiuj de iu nacia lingvo) estas evitendaj.
   Se ties forlaso ne estas ebla, la redaktoro devas doni la solvon interkampe.
3. Apliko de sensencaj, inverse aŭ miksante legendaj kaj litermankhavaj linioj estas evitendaj. Tiaj ne estu pli longaj ol triliteraj, kaj en mezapleksa reto ne troviĝu pli ol kvar tiaj
4. Difino de duliteraj linioj estas bezonata nur tiam, se ili havas memstaran klare difineblan signifon. Se ne, pli bone simple doni la du literojn
5. Du aŭ pli da vortoj en la sama linio estu kune nur tiam, se temas pri regula vortkunmeto
6. La difinoj estu en korekta lingvaĵo, laŭ PV (PIV) aŭ laŭ logika simpla priskribo.

Ĝeneralaj konsiloj

Ne forgesu, ke:
– la celo estas havigi agrablan duonhoron al la solvantoj, tamen utilan ankaŭ, t.e. pere de ludo doni iom da informoj kaj instruo
– por solvi bonan krucenigmon ne estas bezonataj leksikonoj, mondmapo kaj fakvortaroj,
– niajn enigmojn solvas ne nur Eŭropanoj. Kono de eŭropismoj (ekzemple francismoj de PIV) ne apartenas nepre al kondiĉoj de ĝenerala klereco.

Utiligeblaj helpiloj por la kompilado povas esti krom PV: Inversa vortaro aŭ rimaro de Parnasa Gvidlibro.

Bonan laboron kaj amuziĝon deziras:

Márton *Fejes*

Szilárd Bálint

La edzino de aŭtomobilisto

La patro kaj patrino kun la filo kaj filino en granda kunsento vespermanĝis. Dume ekparolis la edzo:

– Kara mia... tiun manĝaĵon vi sukcesis bone kuiri... vere ĉio estas bongusta... ĉu vi donis multan monon por ĝi? ... Kiom kostis la bongustaĵoj?

– Ne multe, ĉar en nia ĝardeno kreskis multe da bonaĵoj por kuiri...

La viro manĝis, manĝadis senvorte. Kiam ili finis la vespermanĝon, la patro diris al la gefiloj:

– Iru en la alian ĉambron... kaj rigardu la televidon, ĉar mi helpos al via patrino en la kuirejo por lavi la teleroj n kaj reordigi ĉion!

– Ni ankaŭ ŝatus helpi... – diris la filino.

– Restu trankvile! Jam tuj ekiru!

La edzino nekomprene rigardis la edzon, sed diris nenion. La gefiloj foriris. En la kuirejo la edzo ĉirkaŭprenis la edzinon kaj ridete diris:

– Vi estas la plej bona edzino... Kion vi dirus, se ni aĉetus aŭtomobilon? !

– Kion? ... Kial? ... Ni estu monkolektantoj tial, ke ni ne veturu per tramo, sed per aŭtomobilo? ! ... En via kapo io ne estas en bona ordo! !

La viro respondis nenion, li sentis, ke ankoraŭ ne alvenis la tempo por akceptigi la fortan deziron. Tamen li pensis pri tio, ke estu inter ili paco, kaj komencis trankviligi la virinon:

– Estu trankvila... mia kara... mi nur diris tiun deziron... se vi ne volas, do ne gravas... precipe se tiu afero ne plaĉas al vi... do, ni iru rigardi la televidon!

Sekvis la monatoj unu post alia, kaj la viro eĉ unu vorton ne diris pri la aĉetado de aŭtomobilo. Diversaj pensoj aperis en la kapo de la edzino, kiam la unuan de la monatoj la ricevita mono malaltiĝis. Ofte ŝi pensis pri tio, ke la edzo havas amantinon, kiu kostas al li multajn monojn. Fine ŝi demandis:

– Kial vi ricevas ĉiam pli malmultan monon, kiam vi laboras preskaŭ tag-nokte?

– Mia kara... nia urbo havas multajn senlaborulojn... se mi volas resti en mia laborejo, mi devas plilongigi mian labortempon kaj ricevi pli malmultan monon...

La edzino kredis ĉion. Ofte ili vespermanĝis buterpanon kun lakto kaj ne vizitis la teatron. Foje antaŭ la pordo de la ĝardeno estis aŭdebla laŭta kriado:

– Edzino! ... geknaboj... venu tuj rapide!

Ili ektimis kaj komencis kuri al la voko. Kiam ili ekvidis la patron, kiu ridetis apud nova aŭtomobilo, ili tuj haltis. La edzo kriis:

– Venu pli proksimen! ... Tiu aŭtomobilo estas la nia! Kara edzino, vi ankaŭ lernos... mi helpos vin lerni la uzadon de la aŭtomobilo, tiel ni faros ekzemplon pri la virina egaleco, ĉar la viro kaj virino naskiĝis kun libera volo!

La edzino ruĝiĝis, poste sentiĝis pro la ĝojo kaj povis diri nek unu vorton. La geinfanoj gaje ĉirkaŭkuris kaj rigardis ĉiun parton de la aŭtomobilo.

Poste sekvis la monatoj unu post la alia, komence la viro instruis la edzinon por la uzado de aŭtomobilo, veturigis la gefilojn al kaj el la lernejo, veturadis kun la edzino por fari aĉetojn, la familio dum la libertempoj veturis al foraj lokoj, al arbaroj kaj lagoj. La edzino ofte rakontis al konatuloj, kiel bona sento estas havi aŭtomobilon.

Post nelonga tempo, ne estis sufiĉa mono por la multa uzado, tial nur la viro veturis per ĝi ĉiutage labori; li sentis sin kiel grandsinjoro, la infanoj piediris al la lernejo, la edzino piedirante aĉetis ĉion en la urbo, ofte en la akompano de la infanoj. Foje iu demandis ŝin:

– Ĉu estas vere bona sento havi aŭtomobilon?

La edzino rigardis flanken kaj diris nenion.

I. Nemere

TURMENTO

Ŝi estis laŭaspekte sensignifa, nigrahara virino: Maldika, nervozmova: Kun mia amiko ni sidis sur la teraso de la flughaveno. Li laboris tie en la direktoturo. Por kelkaj li kuris malsupren al mi. Diskrete li montris la virinon:

– Ĉu vi vidas...? Strangulino... Ĉiutage ŝi aperas. Jam la tuta personaro konas ŝin. Ŝi staradas tutajn horojn ĉe la bariero, rigardante la alflugantajn maŝinojn, kvazaŭ ŝi atendus iun. Sed neniam iu alvenas al ŝi, ĉiam ŝi foriras sola.

Iom ni interparolis ankoraŭ, poste li ĵetis rigardon al la horloĝo kaj forkuris. Mi restis sola. De la teraso mi vidis bone la nordo-sudan descendejon. Pintnaza giganto ĝuste antaŭsvingiĝis, ĝi ĵetis malantaŭ sin la betonstrion. Super niaj kapoj zume cirkulis jam la alia.

Mi eltrinkis la kafon, la virino denove envenis mian vidkampon. Ŝi staris kun flirtantaj haroj, premante la barieron, gapante al la maŝino proksimiĝanta. La megafono krake ekparolis. Knabinoj en brilaj vestaĵoj ĵetis sin bruante antaŭen, la kriego de la motoroj preskaŭ disfendis niajn cerbojn.

La virino rigidiĝis, kiel skulptaĵo. La flugmaŝino fine haltis, alruliĝis la ŝtuparo, la pordo malfermiĝis. Neniun mi atendis, do prefere mi rigardis la virinon. Ŝi pugne tenis la ferbarieron. Kiam malaperis eĉ la lasta pasaĝero, ŝi langvoriĝis kaj turnis sin. Ie alte ekmuĝis la sekva alvenonta flugmaŝino: Ŝi suprenrigardis, kaj denove kaptis la barieron.

Post kelkaj tagoj mi rakontis la aferon en societo. La dommastro, pensiita piloto, kapjesis:

– Mi konas ŝin ... Ŝia edzo estis mia kolego. Li falis en la oceanon, antaŭ sep ...? ne, antaŭ ok jaroj ... Nur olea makulo restis sur la akvo, kadavrojn oni ne trovis ... Tiu kompatinda virino ne kredas, ke mortis tie ĉiuj. Eĉ hodiaŭ ne kredas. Ŝi atendas sian edzon. Ĉiutage atendas ...

D-ro Ferenc László

Vagado sub la stratoj de Budapeŝto

La kloakaro de la ĉefurbo rakontas

En la antaŭaj artikoloj de H.V. ni provis prezenti Budapeŝton kiel urbon de banejoj. Venas jam la vico por prezenti la kaŝitan vizaĝon de la metropolo, lerte kovritan de la pavimoj; ĝi etendiĝas en la subo, modeste, en la nekonata malhelo. Sub la viglanta urbego longas 2600 km-jn la reto de la ĉefurba kloakaro, kiu ankaŭ mem fidinde signas la etapojn en la forta disvolviĝo de Budapeŝto.

La dumiliona ĉefurbo, ĝiaj industrio kaj loĝantaro ĉiutage konsumas 1 milionon m^3 da akvo. Forigi la tiel estiĝantan malpuran akvon – samtiel la pluvakvon – pruviĝis nepre necese por eviti ĝenojn de la urba vivo, kaj defendi sekure la sanon de la loĝantaro. La kloakaro grave kontribuas por malhelpi la epidemiojn; aliflanke ĝia tasko estas ŝirmi la urbon de la postpluvega akvoamaso, kiu povus paralizi la ĉiutagan vivon, inundante la stratojn, placojn kaj konstruaĵojn.



La centra pumpilejo (Ferencváros) en 1894

Kanalizacio en la antikvaj urboj

La homamasiĝo en urboj jam antaŭ miljaroj postulis defluigadon de poluakvoj el la dense loĝataj urboj pere de kloaka reto. La plej malnovaj restaĵoj tiurilataj troviĝis en valo de Induso el la 3a jarmilo antaŭ nia erao. Aparte menciindas tie la urboj Mohenĵo-Daro kaj Harapa, kie la restaĵoj montras spurojn de tuturba kanalizacio. En la stratoj kolektejoj atendis enfluaĵojn el la domaj kanaletoj. Norde de Hejderabado, ĉe ruinoj, elfositaj apud la rivero Induso, distingiĝis 3 niveloj de urboj, unu super la alia. Eĉ ĉe la plej malsupra loĝloko rekoneblas la spuroj de la kanalizacio.

En *Babilono, Ninevo, Kreto* kaj *Egiptio* la elfosadoj multloke trovis restaĵojn de kloakoj, al kiuj ofte estis kontaktitaj domaj konduktiloj. En Egiptio (ĉ. 2500 a.n.e.) iun elfositan kanalreton kovris brikoj kaj ŝtonoj. En Kreto la miteca Labirinto, tiu ega palaco estis vaste ekipita per defluigaj kanaletoj, kiel la nuntempa vizitanto povas bone rimarki.

En Jerusalemo ĝis nun ekzistas antikva kanalaro, kiu forfluigis pluvakvon kaj malpuraĵojn, verŝajne unuafoje kiel unuigita sistemo. Ties tasko estis forkonduki la akvojn el la Preĝeja-Kvartalo kaj el la Supra-urbo al la Kidron-valo. La preĝej-konstruadoj de reĝo Salomono (970–930 a.n.e.) daŭris ĉ. la jaroj 960, sekve tiu kanalaro aĝas pr. 3 mil jarojn. Laŭ aliaj fontoj, same en Jerusalemo, el la epoko de reĝo Davido (reĝis ĉirkaŭ 1000 a.n.e.) restis kanalo 600 m longa, 2 m alta kaj 0,6 m larĝa – hakita en roko kun volba formo.

En la *antikvaj grekaj urboj* estis same gravaj la instalaĵoj por akvoprovizo



Sekco de la maŝinejo en la centra pumpilejo (1894)

kaj kanalizacio. En la grandaj urboj, precipe en Ateno, multloke troviĝis detaloj de kanaloj por poluakvoj. Sub stratoj de Ateno estis trovita tuta kloaksistemo. Kelkloke eĉ la kloakon fermintaj kluzoj estis parte trovitaj. La diametro de iu granda kloako – konstruita el bakitaj argiltuboj – estas 0,67 m. La fabrikado de la tuboj okazis el du duoncilindraj partoj, kiujn oni kunigis helpe de plumbaj hokoj. (Tiu alta teknologia nivelo kompreneblealudas al la alta inĝeniera scio de la grekoj, kiuj multe evoluigis la antikvan geometrion kaj teknikon.) Oni ofte hakis – ankaŭ en Ateno – en la roka grundo la kloakojn, kaj la kloakakvon uzis sur la pli malalte situantaj kampoj por irigacio.

La plej malnovajn defluigajn kanalojn sur teritorio de la *Romia Imperio* probable konstruis la etruskoj, dum regado de Tarquinius Priscus (616–579 a.n.e.). Estis fama la *Cloaca Maxima* en Romo, kiun li konstruigis laŭ instrukcioj de etruskaj inĝenieroj: ties longo estas 738 m, alto 4,27 m kaj larĝo inter 2-3 m. La Cloaca Maxima sekvas la kuŝujon de eta rivereto kun konvenaj enprofundiĝoj per volbo tegmentite. Ĝia konstruado samtempe kontribuis al sekigo de la marĉa tereno inter la sep montetoj, krome al senakvigo de Forumo.

Okazis foje (ankaŭ en la antikva Grekio), ke oni konstruis kloakojn kun duoncirkla sekco kaj tegitajn per ŝtonoj aŭ brikoj. Tempe de Julio Cezaro iĝis kutimo domajn pluakvojn forkonduki per kanalaro. Cezaro eldonis en j. 47 a.n.e. dekreton pri la publika purigo de la ĉefurbaj stratoj. Dum la regado de Aŭgusto tiuj taskoj apartenis al la *Curatores Viarum* (strato-zorgantoj), kiuj disponis de tempo al tempo por lavi la stratojn per pura akvo.

Imperiestro *Tiberio* (42 a.-37 p.n.e.) kreis jam oficon por inspektoro de la kanalaroj. Tiu oficisto – „curator alvei et riparum Tiberis et cloacarum" – devis zorgi ankaŭ pri pureco de la rivero Tiberis. Por kovri la kostojn de konstruado kaj subtenado de la kanalaro, Tiberio enkondukis novan imposton, nomitan „cloacanum".

Al la ĉefverkoj de la Romia arkitekturo apartenas la grandaj publikaj banejoj, inter ili tiu de *Caracalla* (imperiestro), konstruita ĉirkaŭ 215. Ĝiaj defluigiloj longas sume 5 km-jn! Tiaj banejoj estis malkovritaj ankaŭ en Hungarlando (Aquincum) – tiujn ni konatigis en pluraj artikoloj dum 1980.

En la antikvaj Romaj stratoj (ankaŭ en aliaj urboj) ekzistis jam kloakfaŭkoj por enlasi la pluvakvon. Kelkaj el tiuj havas kuriozan formon, tiel en Romo la „Bocca della verità" (faŭko de l' vero). Ĝi formas sur 1,5 metra marmorplado homan vizaĝon kun buŝego, tra kiu defluas la akvo en substratan kloakon.

La greklingve skribanta historiisto de l' epoko de Aŭgusto, Dionysios, akcentas la grandajn sumojn elspezitajn por subteni la kloakarojn. Ekzemple iufoje kostis mil ortalantojn la purigo kaj forigo de ŝlimpleniĝo kaj ŝtopiĝo el strataj defluigiloj. Ĉiuj ĉi montras, ke jam al la antikvaj urboj, al ties normala vivo alligiĝis la kanalreto kiel necesa faktoro de la higieno.

La komencoj de la Budapeŝta kanalizacio

Kvankam jam la romianoj konstruis kanalojn, kloakojn en Budapeŝto, tiuj havas nenian rilaton al la nuntempa kloakaro. Sed ni konas el la 16a jc. ordonojn de la Viena kortego por kontraŭbatali la epidemiojn, kiuj – precipe la pesto – dum la turka invado etendiĝis ĝis Vieno. Tiuj „Infekto-ordonoj" estis validaj ankaŭ en la hungaraj urboj (sub Habsburga regado), postulantaj balaadon de kortoj kaj stratoj merkrede kaj sabate, forportadon de malpuraĵoj el la urbo, akvan lavadon de strataj defluigiloj kaj fosaĵoj. Estas iom karakteriza la malpermeso ĵeti surstraten balaaĵon kaj alian rubaĵon...

Post likvido de la preskaŭ 150-jara turka okupado, Buda kaj Pest komencis evolui – ankaŭ ekster la urbomuroj de la malnova Pest (inter la nunaj ponto de Libereco kaj Ĉenponto). La forigo de malpuraĵoj kaj de poluakvoj ne donis multe da zorgo: la fosaĵoj kaj Danubo englutis ĉiun malpuraĵon. Baldaŭ estis faritaj ankaŭ subteraj kloakoj, precipe por la pluvakvo.

Ĉirkaŭ 1800 jam akriĝis bezonoj por pli ŝirmi la higienon kaj purecon de la tri urboj: Buda, Pest, Óbuda; la modernigo de la kanalizacio iĝis neevitebla. Tiutempe komenciĝis la nova periodo, kies strebadoj finfine formis Budapeŝton la nun konata grandurbo. Ni devas mencii, ke la ebenan teritorion ĉirkaŭ Pest ankoraŭ multloke trasekcis defluaj fosaĵoj, eĉ meze de la nuna Internurbo „fluis" la ŝlima enhavo de longa fosaĵo al Danubo, preter ĝi nur plektita barilo ŝajnigis la zorgadon de la magistrato.

Kronprinco Jozefo, kiel vicreĝo, mem prezentis sian rekomendon al la reĝo pri „beligo de Pest" (1801). Prop-



Pumpilejo en Norda Buda (Zsigmond-placo)

onante, ke mem la Gubernia Estraro direktu la beligon de la urbo, li substrekis ankaŭ la kanalizacion: „Por la strata pureco kaj la sano de la loĝantaro, ĉiu urbo bezonas subterajn kloakojn. Tiu bezono estas eĉ pli granda por Pest, ĉar la vento portas en la urbon multege da sablo. Kaj ĉar la akvo ne trovas eblon deflui, la pluva vetero ekigas pro la stagnanta pluvakvo profundan koton, kompletan marĉon. La novaj kloakoj estos alligendaj al la jam ekzistantaj, al kiuj ankaŭ la domposedantoj – tiucele instigendaj – devos kondukigi siajn domajn defluilojn...

Antaŭ la ĝenerala kanalizacio la opaj kloakoj direktiĝis al Danubo laŭ la plej mallonga linio. Mem la kloakoj estis konstruitaj troamplekse, ne laŭ la sufiĉa sekco; apud kelkaj stratoj eĉ de unu domo aŭ korto al la alia la sekco ŝanĝiĝis (funele); tre diversaj mezuroj kaj formoj konstruiĝis.

La unua dekreto pri kanalizacio

La Gubernia Estraro alsendis en 1847 la unuan dekreton pri kanalizacio „al la libera reĝa urbo Pest... pri la konstruendaj subteraj kloakoj." Tiu dekreto jam klasifikis la diverscelajn defluigilojn – en maniero valida ĝis nun – kaj distingas inter la publikaj kaj privataj. La publikaj kloakoj estas: ĉefaj kloakoj, strataj kloakoj, alfluigaj kloakoj, defluejoj, por forigi pluvakvojn.

La *Dekreto konstatas,* ke la kloakkonstruado estas ekskluziva rajto de la urba magistrato, kaj tiurilate ĝi determinas tiujn urbajn devojn. La konstruantaj entreprenoj per aŭkcio estas komisiendaj. La neceson kaj lokon de konstruigo determinas la urba konsilio, kun konsento de la elektantaj urbanoj. Samtempe kun la konstruado de la urba kloako oni devas zorgi pri alligo de la domoj. La kostoj de la strata kloako ŝarĝas domposedantojn en la strato, pri tio la dekreto preskribas eĉ la detalojn.

Grave kontribuis al la disvolviĝo de la ĉefurba kanalizacio univ. prof. J. Fodor, kuracisto, kiu asertis la daŭran malfortiĝon, malpliiĝantan rezistecon kontraŭ tifo kaj ĥolero en tiuj urbopartoj, kie la grundakvo altas kaj infektiĝis (malsekaj loĝejoj, infektitaj put-akvoj ktp.). Li demonstris, ke „la grundo de Pest en kvarmetra tavolo enhavas tiom da animala malpuraĵo, kiom 100 000 homoj eligus dum 37 jaroj". Krome, ke en domoj kun kondukita akvo nur unu homo mortis pro ĥolero el 400 personoj (inter 1869-77), elinter la putan akvon konsumantoj mortis du el 400.

La morto-proporcio estis alta pro la epidemiaj malsanoj, kaj tio, kune kun la malpuriĝo de la ĉedomaj putoj igis neprokrastebla ankaŭ la konstruadon de la urba akvokondukilo. En Buda – en la Fortikaĵo – ekzistis jam akvokondukilo. En Pest la unua akvoprovizilo post longa hezitado nur en 1868 ekfunkciis ĉe la nuna Parlamento.

La funkciado de la konstruiĝinta ĉefurba akvoprovizado favore influis ankaŭ la kloakfunkciadon. Kiam la urba loĝantaro konsumis akvon nur el propraj putoj, oni uzis da ĝi nur malmulte. La eta akvokvanto enfluanta en kloakojn ne kapablis kontentige kunfluigi la malpuraĵ-kvantojn, tiuj sedimentiĝis kaj putriĝis – el la kloakoj eliĝis neeltenebla fiodoro. Oni apenaŭ kredus nuntempe, kiom da zorgoj premis la projektintojn de la kloakaro por likvidi tiujn malagrablajn konsekvencojn. Ĉe ekzamenado de la kanalizacio-projektoj pro tio oni tre amplekse okupiĝis pri la ventumado kaj akvumado en tiu tempo.

La akvokondukilo kunportis gravan kreskon de la loĝantara akvokonsumo. La kreskinta akvo en la kloakoj jam kapablis kunfluigi la masojn, krome la ŝlimsedimentiĝo forte malkreskis. Tiel la konvene deklivantaj kloakoj iĝis memurigaj, kaj la haladza, naŭza odoro ĉesis.

Meze de la pasinta jarcento multaj Eŭropaj grandurboj komencis kanalizacii. Tiuj influis ankaŭ Budapeŝton. Pioniro estis Anglio, kiu unua deduktis la instruojn el la granda epidemio de ĥolero (1831). Kreinte la unuan leĝon pri publika sano (kanalizacio) ĝi akiris gvidan rolon tiurilate, kaj ties sekvo estis la granda partopreno de

Subterigita defluigilo (origine „Diabla fosaĵo") dum riparo

Anglaj fakuloj ĉe kanalizado de la alilandaj grandurboj.

Por la sistema kanalizado de Pest, angla entreprenisto, Sir Morton *Peto,* metis antaŭ la urbestron projekton. Ĝia tuta titolo estis: „Raporto kaj Projekto en afero de plibonigo de la subtera kanalizacio en libera reĝa urbo Pest. Nome de Sir Morton Peto ĝin prezentas W.I.Bazalgette, ĉefinĝeniero de urbo Londono. Pest, monato junio, 1869."

La oferto proponis konstruadon de la ĉefaj kloakoj je prezo de 250 mil sterlingaj pundoj. Bazalgette konatiĝis en Pest kun la jam ekzistanta kloakreto, kaj konsideris ankaŭ la tiam eventualan reguligon de Danubo. Li klare rekonis la topografiajn donitaĵojn – Pest situas en vasta duonbaseno ĉirkaŭata de montetoj kaj dekliva al Danubo – kaj la liniojn de la ĉefkloakoj li tiris adekvate al la naturaj cirkonstancoj. Tio klarigas, ke la sekvaj provizoraj kaj fine la aprobitaj planoj esence ne deviis de projektoj de Bazalgette. Li proponis tri ĉefajn kolektajn kloakojn; el tiuj du servis por kolekti akvojn de la Danub-proksima malalta zono, la tria por fari tion en la

Dum aliformigo de l' granda ĉefkloako sub la Granda Bulvardo

alta zono. La kanalizacio de la urbo havus unuigitan sistemon, t.e. sistemon defluigantan en sama tubo la mastrumajn (fekaĵajn kaj aliajn domajn) kaj la industriajn malpurakvojn, krome la pluvakvojn. Tia, unuigita sistemo funkcias ankaŭ en la kanalizacio de Londono, Hamburgo, Frankfurto, Gdansko, Berlino, Munkeno k.a.

Bazalgette – kalkulante deklivojn kaj mezurojn por la kloakoj – kalkulis kun 200 000 loĝantoj de la ĉefurbo(!). Dum seka vetero la defluaĵon li konsideris sur bazo de la Londona akvokonsumo (po 140 litroj por loĝanto), kaj tiel kalkulante rezultis defluo po 330 litroj dum sekundo. Kompreneble la unuigita sistemo postulas konsideron de la pluva vetero, ja la tiutempe liverenda akvokvanto determinas la defluigan kapablon de la ĉefkloakoj. Bazalgette proponis kiel kapablon po 1,9 m^3 sekunde, alkalkulante ankaŭ la pluskvanton de malpurakvo pro la venonta loĝantara kresko.

Tiuj ideoj montriĝis ĝenerale ĝustaj, escepte la mezurojn de la ĉefkloaka defluiga kapablo. Tion simple klarigas jam la supre citita nombro de la loĝantaro, Bazalgette konsideris multe pli malrapida tiĝs kreskon ol ĝi okazis vere. La popolo de Budapeŝto ekde la



La kloakakvo-purigejo en Suda Pest

mezo de la 19a jc. salte kreskis, jen por pruvi: en 1870 la loĝantoj estis 280 mil – en 1900 733 mil – en 1930 pli ol 1 miliono. Komparante tridek Eŭropajn grandurbojn pri loĝántara kresko, en 1900 Budapeŝto okupis la unuan lokon, en 1930 ankoraŭ la duan lokon.

Post la unua mondmilito malfermiĝis vasta konjunkturo de domkonstruado, kion sekvis etendiĝo de novaj urbopartoj kun postuloj de plua kanalizacio. Ties kontentigo estis aparte malfacila en Pest pro la menciita malsufiĉa kapacito de la ĉefkloakoj. Aliflanke la zorgoj kreskis ankaŭ pro rapida disvastiĝo de etaj familiaj domoj en la eksteraj zonoj de la ĉefurbo. Notinde tial, ĉar la familioj kun negranda monujo tie trovis ankoraŭ etprezajn terenojn por konstrui domojn por si, kontraŭ la jam altaj prezoj en la internaj distriktoj. Pro manko de kanalizacio de tiuj zonoj baldaŭ aperis sanitaraj problemoj, precipe tie, kie la grundakvo staris alte, kaj tial la ne forigita poluakvo infektis ĝin. Do, tiaj kaŭzoj devigis la ĉefurbon denove pliampleksigi la kanalizacion.

La plenumado komenciĝis – necese – per plivastigo de la ĉefkloakoj, kaj nur poste eblis konstruigi la alfluigajn kloakojn. Inter 1927–37 tiaj kloakoj efektiviĝis en 380 stratoj, sume en longo de 134 mil metroj.

Bedaŭrinde eĉ tiu ampleksigo ne atingis la bezonojn, devenintajn de la urbokreskado, sekve estis necese prilabori pluan programon de ampleksigo. Tiun programon – sesjaran – la ĉefurba deputitaro akceptis en 1938, tamen ĝi realiĝis nur parte, ja intervenis la dua mondmilito, haltigante la laborojn.

Post la jaro 1945

Estas internacie konate, ke la dua mondmilito detruis multege en Budapeŝto. Ankaŭ la kloakaro multe suferis, kies restarigo montriĝis laŭvorte vivnecesa. Oni devis rapide ebligi forkondukon de la poluakvoj, por eviti ekeston de epidemioj, kies facilaj viktimoj povus esti la multe suferintaj, malfortiĝintaj loĝantoj.

En la heroa periodo de la postmilita rekonstruado rekreiĝis ankaŭ la Ĉefurba Kanalizacia Servo, kies grandegajn taskojn iom desegnas la ciferoj: pro la bomboj kaj enurbaj bataloj la kloakaro difektiĝis en 143 lokoj entute 3360 m longe. El tiuj jam en 1945 oni restarigis 2125 m-jn, en 1946 ankoraŭ 460 m-jn, kaj en 1947 tiuj laboroj plene finiĝis.

Krom la kloakaro grave difektiĝis ankaŭ la (pumpilaj kaj filtradaj) kluzejoj. Tien falis 32 bomboj. Unue oni devis senigi de ĉiaj baroj la defluadon de la poluakvoj, ja ĉia ajn reteniĝo povis kaŭzi sanitarajn danĝerojn. La restarigo de la kluzejoj jam sukcesis en 1946, kaj en la sekva jaro oni okupiĝis pri plena likvido de la difektoj de konstruaĵoj kaj aparatoj.

Post restarigo de la militaj damaĝoj estis farita la kanalizacia programo kadre de la tutlanda trijara plano. Ĝin karakterizis la projekto de novaj kolektaj kloakoj. Kaj vere, en la trijara periodo oni konstruis da ili 4155 m-jn, krome preskaŭ 13 km-jn da alfluigaj kloakoj. Pluan gravan taskon prezentis – post kreo de Granda-Budapeŝto – likvidi la postrestintan situacion de la novaj periferiaj distriktoj: levi je ĉefurba nivelo la ĝis tiam ne kontentigajn publikajn servojn.

La antaŭe memstaraj – nun al la ĉefurbo aliĝintaj – urboj kaj vilaĝoj formis sian kanalizacion ĝenerale ne laŭ la naturaj akvokolektaj regionoj, sed interne de siaj administraj limoj. Kvankam la projekto de la ĉefurbo jam en 1938 konsideris la kanalizaciajn kontaktojn kun la ĉirkaŭaj loĝlokoj, tamen la nur skiza projekto ne ebligis konvenan realigon, eĉ ne konkretajn planojn por konstruado. Estiĝis urĝa tasko por krei teknike kàj ekonomie kompleksan bazon por disvolvi la kloakreton en la „novaj" distriktoj.

Krom la disvolvo de kanalizacio en la periferiaj distriktoj, la ĉefurbo devis novajn taskojn surpreni pro la granda evoluo de la industrio. La industriigo kaŭzis egan kreskon de la poluakva kvanto, kaj tio multe superis la siatempe konsideritajn mezurojn, tiujn dum la konstruado. La kutime mastruma-karaktera poluakvo ŝanĝiĝis pli kaj pli je industria-karaktera. Tio signifis fortiĝantan danĝeron por la akvokvalito de la ĝin akceptanta Danubo! En 1957 estis komencita revizio de la ĝistiamaj planoj, kaj prilaboro de perspektiva plan(ar)o, kiu okupiĝas ankaŭ pri akvokvalito de la „akceptanto", kaj determinas la konvenajn formojn por la disvolvo.

Kompreneble restis bazo por la perspektiva plano la jam ekzistanta kloakaro, precipe ties ĉefaj kolektaj kloakoj. Funkciis jam la grandaj pumpstacioj ĉe finoj de la ĉefkloakoj. La jam investitajn plurmiliardojn valorantajn konstruaĵojn oni devis gardi ankaŭ laŭ la nova plano, kiom eble.

Rezulte de tiu perspektiva plano nun jam plilongiĝis je 2600 km la kloakaro de Budapeŝto. La traigon de la kloakakvoj en Danubon plenumas naŭ grandaj, konstante funkciantaj pumpilejoj. Laŭplane konstruiĝis i.a. la Sud-Peŝta Kloakakvon Puriga Stacio, kiu post ekfunkciigo purigis tage 50 000 m^3 da kloakakvo, kaj post pliampleksigo en 1980 jam kapablas ĝis 72 000 m^3 tage.

Favore al medioprotekto en 1972 oni kunmetis la Ĉefurban Programon pri purigo kaj forigo de kloakakvo. Laŭ tiu, ĝis 2000 la tutan amason de la ĉefurba kloakakvo oni devas purigi kaj nur poste enigi en Danubon. Kiel parto de tiu programo konstruiĝas en nordo de Budapeŝto kloakakvo-purigejo kun taga kapablo de 560 mil m^3. Fine de 1980 ekfunkciis ĝia meĥanike puriga fazo; la biologie puriga fazo (kun kapacito de 140 mil^3) ekfunkcios en 1983. La plej poluitaj kloakakvoj de Nord-Peŝto do estos biologie purigataj kaj nur tiel kondukataj en Danubon – priatentante zorge la fundamentan devon: ŝirmi la vivnutran akvon de la riverego.

Tradukis E. *Fenyvesi*

Kloakakvo–purigejo ĉe la paperfabriko de Dunaújváros



Szilárd Bálint

La heredaĵo

Antaŭ kelkaj jaroj mi faris longan vojaĝon en Azio per trajno. Por forpeli la enuadon, mi kunportis malnovan romanon, kiu aperis en la pasinta jarcento kaj mi legis ĝin, kiel sube sekvas:

...Komenciĝis la printempo, sed sur la pintoj de la montoj ankoraŭ brilis la blanka neĝo. La suno jam forte varmigis la teron, degelis la glacio kaj ŝveligis la kuregantajn riveretojn. Apud la lago estis gastejo kun kelkaj gastoĉambroj, en la restoracio kartludis la kutima kompanio el la eksterurba medio.

Jam vesperiĝis, kiam per biciklo nova gasto alvenis. La viro portis sakon sur la dorso, malantaŭ li sur la pakaĵportilo sidis 10-jara ĉarma knabino, fine eĉ malgranda kofro pendis sur la biciklo. La gasto petis malkaran ĉambron kaj modestan vespermanĝon. La knabino avide manĝis, videble ŝi estis ege malsata. La viron tute ne interesis nun la publiko de la gastejo, li manĝis trankvile, ĉirkaŭita de scivolemaj rigardoj.

La postan matenon dum la matenmanĝo s-ro Berger komencis paroli kun la gastejisto:

– Ĉu vere morgaŭ finiĝos la limdato de la luigo de Ormosi-familia bieno, kies posedantoj estas nekonataj?

– Jes, estimata sinjoro, sed apenaŭ estos trovebla homo, kiu aĉetus aŭ luus ĝin...

– Kial?

– Ĉar la plugtero estas neproduktiva, la kastelo estas neloĝata kaj ruina, ekde jaroj restadas neniu ĉi tie, nur kelkaj vagabondoj embuskiĝas dum kelkaj tagoj, ĝis kiam la policistoj kolektas ilin. Tiu loko vere estas fantoma tereno, kiel praarbaro plenplena de herbaĉoj kaj sovaĝbestoj, kelkaj homoj eĉ supozis vidi fantomojn!

– En ĉiu malbono estas iom da bono ... mi certe luos ĝin!

– Laŭ via bontrovo... – rigardis la gastejisto al la stranga viro, kiel oni rigardas trankvilajn frenezulojn.

En la sekvanta tago en la urbo ĉe la notario vere s-ro Berger estis la unusola aperanta persono, tiamaniere tuj estiĝis la interkonsento, post kiam s-ro Berger antaŭpagis la luprezon por kvinjara daŭro. La monsumo estis deponita en la urba banko por la eventualaj heredantoj. Dum kelkaj semajnoj s-ro Berger loĝis kun la ĉarma Alica en la gastejo, dumtage la filino restis ĉi tie kaj volonte helpis en la kuirejo kaj ĝuis la kuiradon.

S-ro Berger estis vortavara homo, neniam parolis pri tio, kion li faris dum la tuta tago en la malzorgita domego. Intertempe li dungis metiistojn kaj farigis reordigon en tri ejoj de la granda domo kaj komencis mastrumi. Por Alica li alportigis edukistinon kaj la ĉarma filino faris ekzamenon en la urbo.

Pasis unu jaro en la bieno, kiu portis nur tiom da enspezoj, kiom estis sufiĉa por la dungitoj, kaj pagi la kostojn de la mastrumado. Sed s-ro Berger neniam faris kontakton kun aliaj homoj, nek akceptis gastojn, nek invitojn.

Proksime de la loĝdomo staris malnova kapelo: la tegmento estis kaduka, la turo flankenkliniĝis, la muroj krevis. Okaze de tempestoj la sonorilego minace eksonis. Neniu havis kuraĝon por eniri kaj restadi en la kapelo, nur s-ro Berger vizitis la konstruaĵon de tago al tago. Unufoje nokte la kapelo enfalis kaj kun granda bruo la muroj kaj la fenestroj falegis sur la tombokelon, kiu ankaŭ disfalis. La oficialaj personoj trovis nenian eksterordinaran aferon, ĉar neniu estis difektita, nur la malnovaj ĉerkoj kaj ceteraj objektoj frakasiĝis. Inter la ruinoj oni trovis unu malplenan rustan ferkeston, sur kiu estis videblaj freŝaj kandelgutoj, sed la polica komitato pensis, ke post la kunfalo multaj scivolemaj homoj serĉadis diversajn aĵojn, verŝajne ankaŭ kun kandelo.

Pasis kvin jaroj, la vivmaniero en la bieno tute ne ŝanĝiĝis. S-ro Berger restis malafabla, ne faris ekscesan elspezadon, sed akurate pagis la dungitojn. Li ne religis la kontrakton pri la bieno, sed iutage kun malmultaj pakaĵoj forlasis ĉion, informinte neniun kien li foriris kun Alica.

La bieno dum kelkaj jaroj restis denove sen farmanto. Fine la notario en la nacia arkivo retrovis la genealogian arbon de la iama familio kaj metis anoncon en la gazeton. Post monato anonciĝis juna parenco, inĝeniero, kiu sciis nenion pri la bieno. Post la oficiala procedo li mem komencis mastrumi science kun granda sukceso. Kiam la kastelon li restaŭrigis, la masonistoj trovis kesteton. En ĝi estis flava skribaĵo pri ormonoj, kiuj estas troveblaj en ferkesto en la kripto. La ruinojn de la kapelo jam kovris densa vepro, tamen la homoj retrovis la rustan malplenan ferkeston. S-ro Ormosi komencis esplori pri la mistika afero.

Maljunaj homoj rakontis ke antaŭ jaroj la lasta luanto estis malriĉa homo, tiel nomata s-ro Berger, kiu kun sia filino Alica transloĝiĝis al nekonata loko, post kunfalo de la kapelo. La juna inĝeniero komisiis privatan detektivon por trovi s-ron Berger. Inter multaj homoj, kiuj portis la nomon Berger, estis trovebla unu, kiu havas filinon Alica. Tiu homo estis riĉa fabrikposedanto. S-ro Ormosi forveturis al tiu urbo kaj volis viziti la maljunan homon, sed li ne estis hejme, ĉar li faris vojaĝon sur foraj maroj. Anstataŭ la patro, la juna, ĉarma Alica akceptis lin.

– Estimata fraŭlino... Ĉu la nomo Ormosi estas konata por vi? – demandis la viro.

– Jes... antaŭ jaroj, mia patro luis bienon kies nomo estis la sama... tie ni loĝis dum kvin jaroj...

– Ĉu vi rememoras pri la malnova kapelo?

– Jes... sed ĝi dum nia restado estis ruiniĝinta...

– Kial vi forlasis tiun lokon?

– Ĉar mia patro ne havis sufiĉan monon por pagi la pluan luprezon... kaj la plugtero estis neproduktiva...

– El kio aĉetis via kara patro tiun fabrikon?

– Mi ne scias... – hezitis Alica – mia patro diris, ke li heredis grandan sumon el Ameriko...

En tiu momento neatendite alvenis s-ro Berger – al kiu la servisto raportis la nomon de la vizitanto – kaj kun granda kolero li kriadis al la viro:

– Kion vi volas ĉi tie? Vi impertinenta homo! Kion vi volas de mia filino? ! Tuj forlasu mian domon, vi insidema dotoĉasisto! !

Kara Legantoj! Bedaŭrinde la lastaj pagoj de la romano mankis, ili perdiĝis. La redakcio petas vian helpon por fini la historion. La solvo ne estu pli ol 30 tajpitaj linioj. La sendinto de la plej bona solvo ricevos libropremion kaj la teksto aperos en la Hungara Vivo. Limdato: du monatoj post la apero.

Daŭrigo

de la historio verkita de Szilárd BÁLINT. Plej sukcese finis ĝin Fritz *Hagemann* (Raschau, GDR), kiu ricevis jam la libropremion.

LA MISTERA FRAŬLINO

Aperinta en n-ro 1/1980

... Nun la policoficiro demandis: Ĉu ŝi estis vundita, kiam vi ŝin trovis? Ĉu ŝiaj vestaĵoj estis malpurigitaj aŭ disŝiritaj?

Jozefo certigis, ke nek la virino, nek ŝia vestaĵo estis malpurigita aŭ difektita.

– Vi certe estas naivulo, se vi kredis al ŝi, ke ŝi estis elĵetita el la trajno ĉi tie, kie tiu havas rapidecon de pli ol 100 kilometroj, kaj nek ŝi, nek ŝiaj vestaĵoj estas difektitaj! ?

Dum li parolis, la policisto foliumis libreton, prenitan el sia poŝo, kaj en ĝi rigardis fotojn de virinoj. Subite li mallaŭte ekfajfis, kaj diris al Jozefo:

– Rigardu atente tiun bildon, kaj diru, ĉu ŝi estas la virino, kiun vi trovis?

– Jes, ŝi estas, mi tutcerte rekonas ŝin – respondis Jozefo post iom da tempo.

– Kaj nun – daŭrigis la oficiro – mi informos vin, kiun vi gastigis: delonge serĉatan spionininon! Verŝajne per aŭtomobilo portis ŝin helpantoj ĉi tien, kie ŝi intencis kaŝe malaperi por observi la proksiman ekzercterenon de la armeo... Pro tio ŝi malpermesis al vi raporti al via staciestro la fiktivan krimon... Kaj vi, stultulo, nenion eksuspektis! Sed kiel ajn vi pensis pri ŝi, vi grave respondecas ĉar vi ne tuj raportis al via estro pri la „eligo" el la vagono! – kriis kolere la oficiro kaj li saltis en la aŭtomobilon.

Ankoraŭ la saman posttagmezon sonoris la telefono kaj la staciestro sciigis al Jozefo:

– Ĝoju, la spionino jam estas arestita. Ĵus telefonis al mi la oficiro, kaj diris, ke mi malatentu vian sendisciplinaĵon, kaj estu por vi sufiĉa puno la okazintaĵo mem, sed alifoje tuj raportu – eĉ se temos pri tre alloga virino!



LETERKESTO

Lentaigne, F. *Montpellier:* Ni kelkfoje jam fiksis nian starpunkton, kiu identas kun la via, pri la glosendaj vortoj, la mankantaj en P.V. Pro influo de Hung.–E. vortaro, tamen foje enŝteliĝas kelkaj sen gloso: *gemuta* (evitenda) volis karakterizi (p.86/1980) agrablan atmosferon de ĉambro; *kalma* (samloke) la trankvilecon, kvankam tute ne temis pri manko de maraj ventoj, kiun aludas ververe tiu vorto. Ni ankaŭ konsentas memkompreneble pri ĝusta uzo de la adverba participo. Do konsentante kun vi tamen ni kredas, ke tiaj eraretoj apenaŭ kaŭzas miskomprenon, eble nur rideton ĉe la legantoj, kaj... ĉagrenon ĉe la redaktoro. Same la ankoraŭ daŭrantaj eraraj opinioj pri participoj, kiuj foje necesigas intuician komprenon de legantoj anstataŭ simplan komprenon de la direndo. La iama ribelo, jes, „estis sufokita *post* kelkaj horoj" – bedaŭrinde nur portempe... Sed tio estas jam alia afero. Ni forte dankas viajn instigajn rimarkojn, ankaŭ vian pravan „nefermitan leteron"!

Elizarov Aleksandro, SU, *Sizran*: Nia plezuro, ke vi plene aprecis konvena la konsiston de nia nro 80/3 eĉ en la detaloj. Ni klopodas cetere doni kiom eble *pli* da beletro, sed necesas – ĉu ne? – ankaŭ iom *pri* la beletro. Krome aperos artikoloj jen pri gravaj personoj, jen pri movadaj aferoj, (ni proksimiĝas ja al la centjara jubileo), tiel via deziro kontentiĝos. Kompreneble ne ĉesos ankaŭ la populara rubriko de Sz. *Bálint*, nia enigmojn ĉasanta kriminalisto. Restos do malkovrindaj aferoj por niaj fantazion havantaj legantoj. Rilate la *reklamojn* oni devas scii – aŭ alkutimiĝi –, ke en la gazetaro (tutmonde!) la reklamoj estas direktataj nur al certa tavolo aŭ grupo kaj ne al ĉiu leganto kiel ĝenerale la artikoloj. Aliflanke: ne forgesu la simplan fakton, ke tiuj reklamoj ebligas financi multajn paĝojn kiuj estas plezure legataj, sed *ili mankus* sen la reklamoj.

Ratassepp Elmar, SU–Estonio, *Valga:* Aparte ni dankas vian interesvekan informon pri Mary Toming kiu el la hungara tradukis en *estonan lingvon* la kuriozan temon traktantan romanon „Fortikaĵo" de Gyula Hernádi. Post la kinofilmo, produktita laŭ tiu romano, la estona eldonejo esperas gravan sukceson ankaŭ por la libro, presita en surprize granda kvanto.

Ŝuvajev Timofej D., SU, *Nifnevartovsk:* Vi informis nin pri granda intereso vekita en via urbo per E-ekspozicio. Ĝi altiris vastan publikon, verŝajne pro sia temo: la olimpiaj ludoj kaj la sporto. Ties plurcent dokumentaĵoj estis kolektitaj el multaj Eŭropaj landoj helpe de nia lingvo, aŭ alie dirite, helpe de nia internacia movado. Estis bona metodo, ke via klubo klare elmontris la Esperanto-rilatojn de tiu kolektado nomojn de esperantistoj kaj E-kluboj, kiuj sendis la ampleksan kaj multspecan materialon de afiŝoj, gazetoj, fotoj, kartoj kaj ceteraj. Aparte impresita estis la junularo kompreneble, ankaŭ la sportistoj, klubestroj kaj la lokaj gazetoj. 15 miloj da vizitantoj estis sendube elstara sukceso, same la alta nombro de aliĝantoj al E-kursoj. Ni varme salutas la aktivulojn de la Klubo Internacia Amikeco kaj aŭguras similajn rezultojn por la venonta ekspozicio.

Al multaj aliaj ni respondas pro manko de spaco perletere.

Helpopeto

Por helpi la redaktan laboron de bibliografio pri *Sándor Kőrösi Csoma,* mi petas, ke ĉiuj, kiuj posedas ĉi-koncernajn datojn – pri artikoloj en ĵurnaloj aŭ revuoj (ĉefe en tiuj aperantaj province), pri rememoraĵoj, recenzoj, literaturaj kaj artaj kreaĵoj; lernejoj, stratoj, asocioj ktp. kun la nomo de Csoma –, sendu ilin al mia adreso: Jenő Zágoni, bibliotekisto, R–4000 Sf. Gheorghe – Sepsiszentgyörgy, Cf. 119, Jud. Covasna, Rumanio.

Korespondi deziras

Karaj Legantoj!
Bonvolu ne forgesi, ke por multaj esperantistoj la ĉefa, eble la sola maniero uzi nian lingvon – estas la korespondado! En la interŝanĝo de leteroj plenumas sian ekziston Esperanto por granda parto de nia publiko, la korespondado do **grave kontribuas** *al la vivo de nia lingvo. Kiam Vi meditas: ĉu respondi aŭ ne, ne forgesu tion! Nepre respondu – eĉ se mallonge – almenaŭ informi, ke Vi ne povas daŭrigi la leterŝanĝon. Klopodu skribi korekte, zorge evitante gramatikajn aŭ vortarajn erarojn – kaj retenu vian emon peti ajnan sendaĵon (ne kredu ĝin senkosta!). Vi tiel partoprenas la Esperantan kulturon – ĝi estu via plezuro.*

E-klubo de *Krasnojarsk*, SU–660075 (p.k. 2420) respondon garantias: *Bloĥina* Elena (23) pĉt, kun Pollando, Anglio, str. Surikova 53–55. – *Viktoruk* Nataŝa (23), pĉt, kun Hungario, Pollando, str. Kurĉatova 1–41. – *Epina* Marina (26) pri sporto, E-literaturo, interŝ. bk, str. Moskovskaja 3a–49. – *Ĵuravljov* Aleksej (24) kun GDR, Hung. Bulg. pri muziko, liter. Str. Kalinina 78a. – *Ĵuravljov* Vladimir (22) sama adr. kun Usono, Japanio pri E-temoj. – *Danilin* Igor (23) pri ekonom., politiko, pacproblemoj, str. Karbyŝeva 10. A–77. – *Erŝova* Elena (22) kun Bulg. Anglio, Pollando. Str. Ŝĉorsa 3–26. – *Stepanova* Irina (25) pri belarto, E-aĵoj. turismo. Str. Meĵajskogo 6–8. – *Smolencev* Viktor (29) kun Jap. Aŭstralio, Usono pri abelbred, radiotekn. – Propaganda ekspozicio bezonas montri taŭgecon de E por internaciaj kontaktoj. Bv. sendu el t.m. salutojn aŭ dezirojn al E-Societo „Amikeco" SU–282.001 *Ternopol* pk. 83. Respondo certa.

(Daŭrigo sur la paĝo 120)

GAJA PAĜO

Validas ankaŭ por humuristo

– Estis ĉiam mia opinio, ke mi vestas min *malnovmode.* Kaj jen... evidentiĝis, ke *tio estas la nuna modo.*

... sed opinio erareblas

– Mi nepre bezonas okuliston, bedaŭrinde mi vidas aĉe – diris la eta lumraŭpo al la alia.
– Kiel vi konstatis tion? – ekbrilis tiu en la nokto.
– Hieraŭ vespere dek minutojn longe mi amindumis forĵetitan ardantan cigaredstumpon...

Ho prezoj, prezoj!

Ĵus alveninta fremdulo volas manĝi en Pariza restoracio. Studas, studas la menukarton... fine li (pardonon, ŝi) ekkoleras:
– Terure! Kiel eblas tiujn delikatajn francajn manĝaĵojn difekti per tiaj sengustaj prezoj!

Urborigardantoj atentu!

La aŭtobuso de la turisma servo ekveturis por ĉirkaŭveturi en la fama urbo. Unue estis rigardata pri vinoj fama restoracio. Poste estis vizitataj la modernstilaj ĉambroj de la alkoholdetoksiga instituto...

Sed ekzistas netrinkemuloj...

– Kia plezuro via neatendita alveno Joĉjo! Sed ne koleru, mi povas vin regali nur per la hejme troveblaj medikamentoj.

...kaj (eĉ!) maledziĝemuloj

– Feliĉe, neniu atendas min hejme. Do mi povas trankvile hejmeniri.

La sinjorino ne estas fruulino

– Edzineto! mi aĉetis teatrajn biletojn por la venonta ĵaŭdo. Do ekvestu vin!

Absoluta senpacienco

karakterizas tiun, kiu eĉ ĉe la dentkuracisto luktas por eniri unua.

Burokrato

– Estimata bandito! Mi transdonas mian monon post viaj gravegaj argumentoj, tamen, nur se vi bonvolas doni al mi kvitancon stampitan.

Ankaŭ malkonfida ulo

– Mi aĉetis dek hundojn. Unu el ili eble estos fidela al mi.

Estas ja memfida uleto...

– Paĉjo! Mi estas jam sufiĉe aga por konduki nian aŭton!
– Vi eble jes, sed nia aŭto ankoraŭ ne.

...kaj memfida ulino

– Izabela, mi rigardas vin nur kiel mian sekretariinon!
– Kial, sinjoro? Ĉu mi estas tiom malbela?

Estas ankoraŭ ŝparuloj

– Paĉjo, mi petas ŝilingon por viziti la Zoon kaj rigardi la serpentegon...
– Prefere prenu lupeon kaj tra ĝi rigardu larvojn en la ĝardeno.

... kaj ŝparulinoj

Policisto al aŭtisto: Via reflektoro ne lumas, sinjoro, pagu tial 50 kronojn.
Edzineto: Vidu, karulo, la riparisto estus petinta cent kronojn, *kiel bone,* ke vi ne mendis la riparon...

... kaj junsaĝuloj

– Mi flankenmetis iom da mono por havi dum maljunaĝo – diris la juna leŭtenanto –, sed prefere mi elspezos ĝin *nun...* kun pli da plezuro.

Venis eĥo al niaj medion projektaj artikoloj

„ Por pli efike ŝirmi la lagojn de la enĵetitaj rubaĵoj, mi proponas, ke la fiŝojn esplorantaj scienculoj produktu kaj bredu „rubaĵojn konsumantan fiŝospecon". Pri la premio mi solene rezignas."

Ankaŭ fisisto?

– Damne, tiu virino estas ne alirebla!
– Perpiede, amiko. Sed per aŭto ne.

Jam kaptita fiŝo

– Kion vi donacis al via edzino je ŝia kvardeka naskiĝtago?
– Mi gratulis je ŝia trideka!

Kontraŭ diskriminacio en drinkejo

– Mi fidele sekvas la kongresan admonon, sinjoro! Neniam mi diskriminacias inter miaj infanoj... *ĉiujn same* mi neglektas.

Sendiskriminacia enigmo

(Mi ne rajtas malkaŝi *ĉu li aŭ ŝi* diris la sekvajn):
– Kredu al mi, antaŭ enlitiĝo mi ĉiam enrigardas sub mian liton, ĉu iu trovas tie... – Kaj? – Bedaŭrinde, *ankoraŭ neniun* mi trovis tie...

Kiu preferas diskriminacion

– Bonkvalitan farbon mi aĉetus!
– Tamen por kia celo? – demandis la vendisto de kolorigiloj.
– Mi tediĝis de mia ĉiama grizeco.

Kaj fine – la komenco

Entute, ĉe la malkovro de la lignorado, de trunko tranĉita, ja! tie originas la nuntempaj aŭtokaramboloj!

Ervin *Fenyvesi*

Esperanta subkulturo?

Giorgio Silfer: Enkonduko al literatura kritiko. Someraj Universitataj Kursoj – Librofako de Literatura Foiro, Kuopio–Lieĝo, 1978. 44 p. 28 cm.

La SUK-kajeroj jam tre abunde kontribuis al la esperantlingva scienca literaturo, sed ĝis nun tre malofte aperis inter ili verkoj, kiuj rekte rilatis Esperanton.

Silfer klopodas fari siajn lekciojn utilaj ankaŭ por la Esperanta literaturo. Difinante la konceptojn de stilistiko, stilo kaj kritiko, li ne forgesas ankaŭ pri la Esperantaj aspektoj, kaj li agas tiel konsekvence ankaŭ ĉe aliaj temoj.

Pri la plej gravaj punktoj de la estetiko Silfer havas tipe okcident-eŭropan opinion, kio ne estas mirinda, ja li edukiĝis per la verkoj de tieaj literaturteoriuloj kaj estetikistoj. Ĉar li deziras resumi ankaŭ la bazajn sciindajojn pri la temo, liaj konstatoj ne povas esti tre originalaj.

La ĉapitro pri la Esperanta kritiko estas jam pli interesa – fakte ĝi estas eĉ pionira. Li pentras pli-malpli veran bildon pri Tárkony, la unua atentinda esperantista kritikisto. Estas bedaŭrinde, ke li celas plie la personecon, eĉ la seksan vivon de Tárkony, anstataŭ lian kritikistan sintenon, perante – kun malaproba kapbalanco – al la vasta publiko klaĉojn, kolektitajn en Budapeŝto.

La plej valoraj partoj de la libro estas la subĉapitroj „Indiĝena kulturo Esperanta" kaj „Internacia kulturo, Esperanta subkulturo". Prave li rimarkas, ke la Esperanta literaturo antaŭ ĉio estas je la servo de la prilingva propagando, eĉ se ne rekte kaj primitive.

Estas bonvene, ke Silfer klare distingas internacian kulturon kaj Esperantan subkulturon. Li atentigas ke la (sub)kulturon indiĝene Esperantan, t.e. kulturon de la Esperanto-movado, ni ne rajtas etikedi „internacia kulturo" kaj kontrabandi ĝin al la sensuspektaj legantoj.

Parolante pri la ŝancoj de la Esperanta literaturo, li postulas liberecon por literaturistoj rilate la porlingvajn instancojn, kio estus afero tre danĝera – se tia libereco objektive eblus. Li sugestas, ke Esperanta literaturo ekhavos veran signifon nur kiam ĝi povos diri ion novan pri la homo ankaŭ al neesperantistoj.

Tiuj lastaj pensoj de Silfer nepre estas daŭrigindaj kaj daŭrigendaj; espereble se ne iu alia, almenaŭ li mem daŭrigos ilin.

Vilmos *Benczik*

Bonvena kaj taŭga

NI KANTAS. (Red. L. Schödl. Eld. Centra Laborrondo Esperanto en KL de GDR, Berlin, 1980. 60 p. 20 cm. Prezo: 5,– M

Antaŭ ni viciĝas ne malpli ol 50 kantoj, oni povas diri, ke el la tuta mondo. De Guantanamera el Kubo kaj Venceremos el Ĉilio, tra konataj germanaj kaj francaj popolkantoj, la muziknotoj kun Esperanta teksto spegulas melodiojn de tre diversaj popoloj, por ke tra Kaŭkazo kaj Siberio oni rondiru la terglobon ĝis Usono kaj Kanado. Apud kantoj naskiĝintaj surlipe de popolaj amasoj, jen vilaĝaj, jen laboristaj, prezentiĝas komponistoj de Schubert ĝis Bob Dylan, sed mi ne listigos ĉiujn: trovu ilin mem en la modestaspekta, tamen teknike senriproĉa libreto. La muziknotoj montriĝas tute klare presitaj. Bonvenige mi salutas preter la notoj la signojn de la akompanaj akordoj, kiuj grave helpos al la kunmuzikantaj gitaristoj aŭ akordionistoj en la gaja rondo de junuloj. Ja prefere por ili estas eldonita tiu libreto, kiu enhavas multajn freŝajn tradukajojn kun laŭdinda lingvajo. Aparte mi substrekas la *prozodian ĝustecon* de la tekstoj ŝajne pri tio grave atentis la redaktisto! –, kiuj estas do kanteblaj sen ajna arbitra aŭ ĝena misakcentado. Tre veršajne tiu ĉi libreto atingos popularecon en someraj tendaroj kaj vintraj renkontoj, ankaŭ ĉe diversaĝaj partoprenantoj de la multiĝantaj internaciaj Esperanto-kunvenoj.

E. *Fenyvesi*



Kvazaŭ historia kinofilmo

Gárdonyi Géza: Steloj de Eger. Historia romano, kiel bildrakonto de Tibor Cs. Horváth, desegnis Pál Korcsmáros, el la hungara tradukis Vilmos Benczik. Eld. HEA, Budapest, 1979. 64 p. 24 cm. Prezo: 6,– ned.gld.

La historio de Orient-Eŭropo dum la mezepoko estis plenplena de invadoj fare de hordoj de la Turka Imperio, kiu en tiu tempo estis unu el la plej potencaj ŝtatoj en ambaŭ kontinentoj, Eŭropo kaj Azio. Ĝi subigis preskaŭ la tutan Balkan-duoninsulon kaj parton de Orient-Eŭropo.

Sub jugo de la turka sultano kaj liaj paŝoj suferis multaj popoloj, inter ili ankaŭ la hungara, kiu heroe luktis kontraŭ la okupantoj. Pri tiu grandioza, tutpopola batalado la verkisto Géza Gárdonyi teksis romanon, eventoplenan kaj buntan, kun karakterizaj figuroj malfacile forgeseblaj. El tiu verko, delonge admirata, kreis bildlibron Cs. Horváth kun la desegnisto Korcsmáros en plezure perceptebla kaj atentostreĉa formo. Ekscitaj epizodoj sekvas sin en rapida formo, okazintaj dum tiu popola batalo kontraŭ la invadintoj, ĝis la pinto, la fame heroa kaj plensukcesa, patriota defendo de la citadelo de Eger. La komponado de la rakonto kaj de la desegnoj, la emociigaj aventuroj de la agantaj personoj, ne ŝparantaj sian vivon por la bono de la popolo, la riskegaj kunpuŝiĝoj, ĉiuj-

ĉi ne permesas al la leganto sin deturni eĉ por minuto. Mi dirus, ke kvazaŭ kinofilmo de historio estas transmetita sur paĝojn de libro. Post aliaj bildrakontoj *Steloj de Eger* ŝajnas al mi ne nur pli distra sed instrua, kaj multe pli serioza ol ekz. „Asteriks", ĉar la aŭtoro, Gárdonyi prezentis arte *veran,* historian fakton.

La kolora kovrilpaĝo igas sopiri, kiel plaĉa estus, se la impresigaj desegnoj estus ankaŭ koloraj. Sed ankaŭ tiel la libro estas samtempe bona helpilo por tiuj, kiuj havas nur siajn unuajn kontaktojn kun la Esperantlingva legado. Kaj tion helpas la tradukinto, kiu sukcese rekreis la tekston en perfekta Zamenhofa Esperanto, sen neologismoj, alireble por la vasta esperantistaro. Bildlibro, inda por havi lokon ne nur en klubaj bibliotekoj (tie nepre!), sed ankaŭ sur librobretoj de ĉiu esperantisto.

Petro *Poliŝĉuk*

Ankaŭ nuntempe bezonata

Ni stenografas. Kurso de Wilhelm kaj Hans Wigner, kun tabeloj de R. Eichholz. Eld. Esperanto Press, Bailieboro, Kanado. 40 p.

La internacia helplingvo faciligas la interkomprenon, liberigante la interrilatojn de la tradicia balasto, kiun uzas la multlingveco. La stenografio, tiu skribteknika helpilo multe simpligas la ĉiutagajn skriblaborojn, kiuj estas ne malhaveblaj eĉ apud la magnetofonoj. Ja ne nur la registrado de paroladoj estas necesaj, sed niaj propraj notoj pri studaĵoj, pensoj, farendoj, personaj kaj intimaj memorindaĵoj. Tiucele la skribbezono estas forte reduktebla helpe de la stenografia notado. Esperanto kaj stenografio estas do raciaj helpiloj en la moderna vivo.

Iliajn avantaĝojn kunigi, ke unu la alian kompletigu, estas jam delonge brava celo en la internaci-lingva movado. Inter aliaj ankaŭ hungaraj stenografoj kontribuis multe al la teorio kaj praktiko de la Esperanta stenografio. Jam en 1912 aperis tiucela verko de L. Jakab, kaj plena sistemo en 1929 (Radnai kaj Kökény) surbaze de la unueca hungara stenografia sistemo. Pri tiu temo la plej ampleksa resumo troviĝas en Enciklopedio de Eo, el plumo de la franca fakulo, P. Flageul.

La jenan kurson la aŭtoroj verkis laŭ la Germana Unueca Stenografio. Ĝi estas lerte kombinita lernilo, kiu povas utile servi ankaŭ por sciantoj de pluraj aliaj sistemoj. Multaj litersignoj estas ja inter ili similaj (ekzemple, duono de la konsonanto-signoj – b, d, g, h, k, m kaj aliaj – estas identaj kun signoj de la hungara unueca sistemo). Rüdiger Eichholz faris bonan servon por la nova generacio, aperigante la libreton. Ĝi utile helpos uzi la malprave neglektatan helpan rimedon en niaj rondoj.

Prunelo

KULTURA-KULTURA-BOOK-DISCO-POSTER-KULTURA-KULTURA

1389 BUDAPEST POB 149

Diru, kiel Vi pasigas Vian liberan tempon:
Mi diros, kia homo Vi estas!

Librojn – en diversaj grandaj lingvoj
ankaŭ en Esperanto
kaj hungarlingvajn verkojn

Diskojn, muzikverkojn
Gazetojn kaj revuojn

AL ĈIUJ MONDPARTOJ VENDAS K U L T U R A
Entrepreno pri Ekstera Komerco
Budapest POB. 149
H–1389

Inkubo de la kubo

Furoras la „hungara monstro"

Dum la lastaj jaroj la plej populara hungaraĵo sendube estas la „mistera kubo", konata ekster Hungario per la nomo „Rubik-kubo" – ja ĝia inventinto estis Ernő *Rubik*. Sed ofte oni nomas ĝin ankaŭ „hungara monstro", ĉar ĝi kapablas frenezigi ankaŭ anime ekvilibritajn, honorindajn civitanojn. Aĉetisto de ludilmagazeno en Manhattan antaŭ kelka tempo asertis, ke „ĝi estas la plej serĉata ludilo en la tuta mondo". La okupiĝo pri la kubo povas fariĝi eĉ danĝera manio, prema inkubsonĝo, forrabanto de la dormo, ĝi ofte malhelpas laboristojn labori, lernantojn lerni – eĉ geamantojn geami... Iuj komparas ĝin al la enigmo de Sam Loyd el la jaro 1873, kiu frenezigis onidire 1500 homojn.

Dank' al la moderna, pli efika propagando, la kubo venkis kapablos frenezigi multe pli da homoj. La entrepreno Ideal Toy Corp., kiu produktas la kubon laŭ kontrakto, subskribita kun la hungaroj, dum la pasinta jaro dissendis 4,5 da milionoj da kuboj. (La vendoprezo de la kubo varias inter 6 kaj 10 dolaroj.) Oni scias, ke en Tajvano kaj Hongkongo ekzistas piritaj kub-produktejoj.

Douglas R. Hofstadter, Pulitzer-premiita docento de la katedro pri komputado ĉe la Universitato de Indiana, jene skribis en la marta numero de la usona revuo „Scientific American": „Se la destino elektis iun fariĝi solvanto de la kubproblemo, tiu devas dediĉi al la tasko de kvin horoj ĝis plena jaro." Sed la okupiĝo pri la kubo estas riskoplena. Hofstadter mencias la „kubo-malsanon", kies simptomo estas juka sento ĉe la fingropintoj, kiun povas mildigi nur longtempa intertuŝiĝo de la fingroj kaj la kubo. Kathleen Ollerenshaw, eks-urbestrino de Manchester devis esti operaciita pro tendeninflamo de la dikfingro – kiun inflamon kaŭzis senfina „kubumado". Okcident-germana virino, donacinta al sia edzo misteran kubon okaze de Kristnasko, nun iniciatis proceson por eksedziniĝo. Ŝi argumentis jene: „Mia edzo apenaŭ parolas kun mi. Se alvenas gastoj, li retiriĝas al sia ĉambro. Kaj kiam vespere ni enlitiĝas, li estas tute elĉerpita pro la kubumado – li ne plu havas fortojn eĉ ĉirkaŭbraki min." Se la kubo ekzistus jam en la tempo de Nerono, certe li turnadus ĝin dum la flamado de Romo.

La 42-jara David Singmaster, kiu instruas matematikon kaj komputadon ĉe la Teknika Universitato de Londono, onidire scias pli pri la kubo ol Ernő Rubik mem. La 60-paĝa verko *Notoj pri la „mistera kubo" de Rubik* aperis jam en la kvina eldono. Angla poŝta inĝeniero sendis leteron al la aŭtoro, kaj informis lin, ke la kubo simple nuligis la efikecon de la laboro en lia oficejo, sed „ĉar ĝi estas ŝtata oficejo, neniu rimarkis tion."

Unu el la kolegoj-matematikistoj de Singmaster sukcesis ordigi la kvadratojn per 50 movoj. Li diras, ke „50 movoj ne estas tre bona rezulto. Oni povus solvi la problemon eĉ per nur dudek movoj, necesas plu serĉi la pli bonajn manierojn."

La junaj ŝatantoj de la kubo koncentras siajn fortojn ne por malpliigi la movojn, sed por redukti la tempon, necesan por la solvado. La rekordon verŝajne havas 16-jara brita mezlernejano Nicolas Hammond, kiu venkis la kubon dum 28 sekundoj.

(El la semajngazeto „Time" koncizige tradukis: V.B.)

Rendevuo kun la futuro

La historia urbo Szombathely en Okcidenta Hungario la 4an de aprilo povis saluti pli ol sescent junajn esperantistojn, kiuj alvenis ne nur el la plej grandaj urboj, sed ĉe el la plej kaŝitaj vilaĝoj de nia lando, kaj alvenis el la najbaraj landoj: Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Soveta Unio, Jugoslavio kaj el Bulgario, Pollando.

En la vico de la Junularaj Esperanto-Renkontoj verŝajne ĉi-nuna okupas gravan lokon. Pasintjare en urbo Tata ni povis vidi simile grandan amason, sed tie verŝajne forte influis la vojaĝemon ankaŭ la avantaĝa situo de la urbo. Kaj ĉi-jare ankaŭ ĉe la rando de la lando aperis same granda amaso. Kial ili entreprenis eĉ plurcent kilometrojn longan vojaĝon? Eble ne nur la programeroj kaj la vidindaĵoj de Szombathely kaj Kőszeg estis allogaj, sed ni povas konstati alian gravan faktoron: nia esperantista junularo konsciiĝis pri sia rolo en la mondo. Kaj tiu ĉi konsciiĝo signifas por ni garantiaĵon por la futuro. Kiam mi rigardis la amason, mi havis la senton, jen ni rendevuas kun la futuro.

Se ni rigardas la pasintjarajn okazaĵojn, ni plenrajte konstatas, ke la interesiĝo pri la internacia lingvo inter la junularo grave plialtiĝis. Eble sufiĉas mencii nur la triobliĝon de la partoprennombro en niaj aranĝoj, aŭ la tutjaran kurson en unu el la plej legataj hungaraj junularaj revuoj.

Samtempe ni spertas, ke paralele kun nia aktivado vekiĝis la intereso ankaŭ fare de la junularaj organizoj. La renkonton krom la reprezentantoj de la opaj sociaj instancoj partoprenis krom la membro de la Centra Komitato de la Hungara Komunisma Junulara Asocio ankaŭ Hannu Rosengren, sekretario de la Monda Federacio de Demokratia Junularo (MFDJ) kaj Leszek Kamiński kunlaboranto de la Sekretariato de Internacia Unuiĝo de Studentoj. (IUS). Ili ambaŭ emfazis, ke la celoj de TEJO multfacete kongruas al tiuj de iliaj organizoj, kaj la daŭrigo de la komencita laboro multe utilus por ambaŭ flankoj.

La partoprenintoj krom la amuzaj vesperoj, dancado kaj urborigardado povis ĝui la prezentadon de la Zagreba Studenta Teatro kaj Dancensemblo „Ungaresca". Sed krome, ili havis ankaŭ abundan laborprogramon. En apartaj sekcikunsidoj pritraktis siajn aktualajn problemojn la aktivuloj de la junulara movado, la junaj komputistoj, la turistoj, la ŝakistoj, la go-ludantoj, la junaj sciencistoj kaj studentoj, la kantemuloj, la biciklistoj, ktp.

Ni esperas, ke ĉiu partopreninto vojaĝis hejmen kun la sento: mi vidis multe, sed bedaŭrinde mi ne povis ĉie ĉeesti. Eble tio ĉi sukcesos la sekvan fojon.

Do, ĝis revido en urbo Nyiregyháza dum JER '82 inter la 9a kaj 11a de aprilo!

Imre *Szabó*

El Tutmonda Sonoro

Dekkvin poetoj – el diversaj nacioj kaj epokoj – sin kaŝas en la ĉefaj linioj de nia enigmo. Ankaŭ tiu ĉi modesta elekto aludas pri amplekso kaj internacieco de la aperonta Tutmonda Sonoro, unu el la ĉefverkoj de K. Kalocsay.

Alsendu kiel solvon tiujn dekkvin nomojn. Limdato: du monatojn post apero de tiu ĉi numero.

Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.

Difino de la ĉeflinioj

Horizontalaj: 1. Japana poeto. 8. Greka poeto el la 3-a jarcento a.K. 57. Bulgara poeto kaj romanisto. 82. Usona poeto (1809–1849). 93. Franca impresisma poeto. 94. Angla poeto el la Viktoria epoko.

Vertikalaj: 1. Romia satiristo el la 1-a jarcento p.K. 14. Antikva greka poeto. 21. Hebrea reĝo, poeto. 51. Japana poeto. 54. Rusa poeto, mortinta en duelo. 58. Belga poeto. 61. Japana poeto. 74. Ĉina saĝulo kaj poeto, la „Maljuna Majstro". 88. Hungara poeto (1877–1919).

Ceteraj linioj

Horizontalaj: 15. Germana aŭ pola lancisto 16. Siberia rivero 18. Krei bildon fantazie 19. Sankta promeso 20. Kaŭzos malplezuron pro senintereso 22. Plej malgranda, supoze nedividebla ero de materio (radiko) 23. Loko, spaco por io 24. ERI 25. Alia formo de vorto „batato"(R) 27. Finaĵo por esprimi frakciajn numeralojn 28. NO 29. Gluti fluaĵon (R) 30. Granda sukplena frukto el fam. de kukurbacoj (R) 32. Sufikso por esprimi femalon 33. Islama lando 34. Arto kuraci 36. Ne submetita al fremda volo 38. Detala plibeligaĵo 39. PPD 41. Internacia Renkontiĝo de Esperantistaj Naturamikoj 42. Aŭtonoma urbo (R) 44. Valora metalo 45. Reen: prepozicio 47. Vestaĵo, kovranta preskaŭ tutan korpon (R) 48. Membro 49. ...-alo: feŭdulo 50. Tuŝi per lipoj (R) 51. Bleki kiel ĉevalo (R) 53. Kuŝmeblo (R) 54. Miksita alo! 55. Trian personon 59. Prepozicio 60. Riski monon en ludo (R) 61. Fortega nenormala inklino al io 63. Lastvice 64. Subdivido de bataliono (R) 66. Fabela, montara estaĵo (R) 68. Aro da fratoj (R) 70. Tuto de veturiloj, movataj de elektra kurento 72. Daŭra plenda krio 73. Konjunkcio uzata post komparativo 75. Eligi bruon de skrapado aŭ frotado 76. Malmola nigra substanco, uzata por hejti 77. Identaj vokaloj 78. Konusforma korba fiŝkaptilo (R) 80. Kuri kun rapideco meza inter galopo kaj paŝado 83. ...nto: grava okazaĵo 84. Ŝtoneca tavolo ne penetrebla de la vegetaĵaj radikoj 86. Greka milionulo, edziniginta la vidvinon de prez. Kennedy 88. Havigi al si (R) 89. Vasta maro (R) 91. Kombinaĵo de oksigeno (R) 92. Italia urbo

Vertikalaj: 2. Miksaĵo de kunfanditaj metaloj 3. Dombesto 4. Membro 5. MO 6. Loĝantino de Azia lando 7. Sin movu for! 8. Fibreca ligaĵo kunliganta ostojn 9. Intime, aparte instruata al adeptoj 10. Persona pronomo 11. Reen: kare ŝati iun 12. Preciza tempo 13. Dolora lasta batalo de mortanto (R) 17. Ideala modelo prezentanta karakterizajn ecojn (R) 20. Malgranda mambesto, kovrata per pikiloj 24. Malkorektaĵo (R) 26. Speco de hakilo 29. Pene tiris post si 31. Persona pronomo 33. Eŭropa duoninsulo 34. Gento (R) 35. Sufikso montranta kolektivecon 37. Loĝanto de Mez-orienta lando 38. Produktaĵon de koko 40. Pure ideala, praktike neefektiva 43. Kiel 41. hor. 48. Provizi per bataliloj 49. Aliro al ies hejmo 52. Loĝejo por nomadoj aŭ turistoj (R) 53. La rapida nevola mallevĝo (artikolo kaj vorto) 55. Kampa vegetaĵo kun blankaj floroj (R) 56. Natria klorido 62. Dediĉos 65. Identaj konsonantoj 67. Nobelon, pli malaltrangan ol grafo 69. Perforte forprenante 71.



RK 72. Dum mallonga tempo 77. Patrino de gepatroj 79. Regulforma globo, ankaŭ medio, agadtereno (R) 81. ISS 83. Komenciĝis 85. Miksita alo! 87. ...elo: rondforma vazo por teni fluaĵon 90. NA 92. UN

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Amuzaj dialogoj en Esperanto

de Albert Lienhardt

„Amuzaj dialogoj en Esperanto" estas ne nur amuzo, sed bona ekzercilo por perfekta Esperanto-parolo.

1. Kiu dialogo komenciĝas per la subaj frazoj?
   „Malbela vetero, hodiaŭ. Ĉu ne, sinjorino Diss? "
2. En kiu dialogo temas pri Richard Burton kaj Brigitte Bardot?
3. Kiom da jaroj havas Alekso, la filo de sinjoro Boll?

Limdato por la respondoj: du monatoj post apero de la revuo.

Korespondi deziras

Ribalkina Tatjana (21) studentino pri sporto, turismo, ekskursoj, muziko, lingvoj, SU–630073 *Novosibirsk,* ul. Geodeziceskaja 2. –– Zdislaw *Szymanski* (24) studento de elektroniko, pri Eo, muziko, piedpilko k.a., turismo, kun samaĝaj gejunuloj. PL–81–402 *Gdynia* str. Szenwalda 5/6. –– Alessandro *Bonato* (45) fraŭlo, I–20131 *Milano* vía Bazzini 30. –– Stojan *Stojanov* (18) mezlernejano kol. pk, emblemoj, ŝtataj flagetoj, BG–4210 *Stambolijski,* Zavodska 5. –– Montar-turismaj klubanoj pri speleologio alpismo, rokgrimpado. Adr. *Dubrovskij* Igor, SU–334200 *Jalta,* Pereulok Halturina 22–31. –– Jerzy *Nowakowski* (39) mek. inĝ.-magistro, instr. en politekniko, prefere kun instruistinoj. PL–15–950 *Bialystok,* Skr. Pocztowa 310. –– Alberto Mario *Pozzali,* I–20127 *Milano,* via Natale Battaglia 29. –– *Skribunov* Viktor (21) studento de fremdlingvoj, pri sporto, turismo moderna muziko, lingvoj. SU–659315 *Bijsk* ul. Vasiljeva 71–10. –– Anoj de junulara E-grupo en kuracloko *Jalta,* SU–334 109: *Pazuha* Natali (17) pri historio, ul. Najdjonova 27–21. –– *Savina* Anna (29) kuracistino, pri psikiatro, ul. Rudanskogo 49–53. –– *Mokrecova* Lilija (29) kursgvid. pri lingvoj, E-movado, vojaĝoj, ul. Spendianova 6–40; –– *Jeremeev* Olej (17) alpisto, ul. Leningradnaja 2–5a. –– *Kirilenko* Natali (17) i.ŝ. insignojn, ul. Komunalnaja 2–5a. –– *Silin* Sergej (17) pri sporto, insignoj, ul. Sverdlova 75–49. –– *Donec* Igor (17) i.ŝ. bk, pm, ul. Krivošti 27–7. –– *Birjukova* Irina (17) pri turismo, diskoj, ensemblo-fotoj, ul. Mišhorskaja 1–2–37. –– Klubanoj korespond-amikojn serĉas: SU–394 036 *Voronež,* ul. K. Marksa 67. Klub Zavoda im. Lenina, Esp. Klub. –– Laimius *Stražnickas* (21) junulo kun gekorespondantoj tm, kol. bk, pm, diskojn, SU–234 580 *Alytus–3,* Litovio, Topolin 3–41. Resp. certa. –– Oskar *Princz* (33) mezlerneja instruisto pri eksterlerneja edukado, kulturigo, artoj, turismo. H–1143 Budapest, Ilka u.32. –– *Dialak* Wladyslaw (40) oficisto pri filmo, foto, muziko, sporto, interŝanĝas kolektas bk, tekston de landaj himnoj, gazetojn. PL–25–324 *Kielce,* str. Armii Czerwonej 160/55. –– *Tanzowska* Elizabeta (17) mezlernejanino, preferas muzikon, poezion, filmojn k.a. PL–83–262 *Czerna Woda* (woj. Gdansk), ul. Ml. Robotnika 20/18. –– *Altmanová* Gabi, i.ŝ. bkartojn, en E-rondeto ZDS. CS–180 00 *Praha 8,* Lindnerova ul. ZDS. –– *Mezey* Johano (39) ĝarden-teknikisto, pri la konceptoj pri Eo, pri turismo, muziko k.a. H–1222 *Budapest,* Andra u.9. –– F-ino *Bieliauskaite* Laima (18) interesiĝas pri moderna muziko kaj bk, ktm. SU–Litovio 234–365 *Stakliškes,* Prieny Raj. –– S-ino *Deák* Istvánné dez. korespondi kun tm, pri ĉ.t. H–1184 *Budapest* Keszőce u. 14/A II.8. –– S-ro *Thumerelle* Jean-Claude (30) instruisto kun geesperantistoj en Aziaj respublikoj de SU, Siberio, Mongolio, prefere pri fotografio, lingvaj problemoj, vojaĝoj. Francio, 59.130 *Lambersart,* 3bis, Rue de l' Avenir. –– F-ino *Kasprzak* Elzbieta (19) interesiĝas pri sporto, filmo, muziko, kol. fotojn de aktoroj, gramofondiskojn, loĝas proks. al Varsovio. PL–05–490 *Piwonin* 28. Sobienie–Jeziory. –– *Jasinska* Janina, turista gvidantino, mezaĝa, ktm. preferas pri arto, floroj, poŝtmarkoj. PL–05–540 *Zalesie Górne k/* Warszawy, ul. Srodkowa 12. –– Skolta Esperanto-Klubo (skoltmajstro Z. Winiarek) PL–08–400 *Garvolino* str. Kościuszki 27, kun diversaĝuloj, kaj kun gimnaziaj klasoj, pĉt. Intervizitoj dezirindaj, ankaŭ en skoltaj tendaroj miksitaj. –– Farmaciistoj-gestudentoj pri infektmalsanoj, epidemiologio, medicingeografio, farmakologio k.s. Adreso de gvidanto: MUDr *Bogdanov* Aleksandr M. SU–252034 *Kiev* KMU–2, Do vostreb. –– S-ro *Urakabe* Šinsaku (42) violinisto, pri muziko, belarto, popola vivo, k.ĉ. temoj. Japanio 572, *Neyagawa,* 9–23 Narita-Higashigaoka. –– S-ro *Senga* Ikuo (instruas E-on en mezlernejo) Japanio 7500, *Honjo* 3456–19, Gifu–SHI, Ginan Kogyo Kôtôgakko. –– S-ro *Tomioka* M. Japanio, *Yamagata* 990, Miya-Mati 1–1–86. –– *Tomoko* Kodaka (21) studentino, pĉt. Japanio, *Hiroŝima* 730, Naka-ku, 8–26 Fujimi-ĉo, ĉe Horiuĉi-apartamento. –– S-ro *Fukui* Masaharu, Japanio 558, *Oosaka,* Jamanouĉi-ĉo Sumijoŝi-ku, ĉe Tamai-so 3–47. –– S-ro *Hirohiko* Hotta (20) Japanio, 573 *Ôsaka-hu,* Hirakata-si, Yamanoue 5-tyôme 33–10. –– *Korjenkova* Natalja N. (22) studentino, pĉt, kol. bk pri naturo, birdoj, fotojn de filmaktoroj; inĝ. *Korjenkov* Aleksandr V. (22) pĉt, pri vivkutimoj, E-movado, muziko, kol. bk, diskojn, poŝkalendaretojn. SU–625.012 *Tjumen* ul. Parkovaja 4A–5t. –– *Vasiljev* Stanislav interŝ. informojn pri voj-trafiko, kol. kalendarojn. SU–350000 *Krasnodar* str. Kirova 120, ap. 4. –– S-ro *Kovnators* Naumo (23) kursgvidanto pri junularo, historio, geografio, vulkanologio, kol. bk, pm. SU–228.730 Latvio, *Aluksne* Omskas 16–2. –– Inĝ. *Burba* Stanislaw kun samaĝuloj pri monta turismo, fotografio naturo, interŝ. mapojn, bk. PL–66–407 *Garzów* Wlkp, ul. Czereśniowa 2. –– Meĥ. inĝ. magistro *Nowakowski* Jerzy (40) kun instruistinoj pri turismo, muziko, fremdlingvoj, ankaŭ germane, ruse. PL–15–950 *Bialystok* Skr. poczt. 310. –– *Machnik* Virginia (20) studentino ktm, pri mod. muziko, kino, interŝ. bk, pm, diskojn, diapoz. PL–30–201 *Kraków* Str. Emaus 15/14. –– S-ro *Jugov* G.I. ktm, pĉt. SU–220050 *Minsk* Do vostreb. –– *Šarjukov* Galina (27) instruistino, SU–703050 *Samarkand* ul. Gagarina 26. kv. 24. –– *Abbosov* Mardon (20) studento, SU–704451 Samarkandsk Rajon, Kolĥoz Uzbekistan. –– *Kim* Svetlana (22) studentino, SU–703050 *Samarkand,* ul. Titova 94, kv. 19. –– *Šakarov* Albert (20) studento, SU–703029 *Samarkand,* ul. Hamida Alimĝana proj. 2, dom. 27. –– *Jermanova* Lilia (21) studentino, SU–703.000 *Samarkand* ul. Ahunbabajeva 49. –– *Hafizova* Hidaĉa (21) studentino, SU–703.058 *Samarkand* ul. F. Hodĵajeva 15, kv. 42.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Respondeca redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141–078, 334–194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: Tibor Vaskó. + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H. I. 215–96–162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 78,– al eksterlando por unu jaro 90,– Forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H–1389. Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 7,–Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – Fejér megyei Nyomdaipari Vállalat, Székesfehérvár. Respondeca gvidanto: Pál Gyenti, direktoro. + **Indexszám: 25 337 ISSN 0018–7704**

ORION TV RADIO



SPEAKER SYSTEM

HS 500

SONRADIATORO

* Tribranĉa elektroakustika aparato kun tri megafonoj
* Nominala ŝarĝebleco 80 W
* Muzika ŝarĝebleco 100 W
* Zonamplekso de sonreprodukto 40– 20 000 Hz
* Frekvenco de rezonanco 55 Hz
* Sontralasiva armaturo kun kovrilo de speciala jersey-teksaĵo
* Enmuntita defenda elektroniko, kiu ĉe maksimuma ŝarĝebleco ŝaltiĝas, kaj defendas la sonradiatoron de troŝarĝo

Hi Fi

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

BÁV

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj. 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért

Konsumturist



18 sept 1981